# MANIFESTO

DE LA

# KOMUNISTA PARTIO

DE

KAROLO MARKS

KAJ

FREDERIKO ENGELS

El la Aŭtoritata Angla Traduko, Redaktita kaj Alnotita de Frederiko Engels, Tradukis Esperanten

ARTURO BAKER

Verkinto de "The American Esperanto Book," Redaktoro de "Amerika Esperantisto"

CHICAGO
CHARLES H. KERR & COMPANY
1908

1231.31.30
Soc 926.14.28
1231.31.30

## TRANSLATOR'S FOREWORD

At the present time, when the historic struggle for existence is losing all individual character, and is merging into a world-wide battle to the death between Organized Ownership of Labor-Power on one hand and Organized Ownership of Tools of Labor on the other, no person can have a clear understanding of the magnificent contest unless he is familiar with the cause and course of the struggle as outlined in the following pages. What Darwin accomplished for biology, and Spencer for moral science, Marx had done at an earlier date for the study of economics.

In the development of this world-wide struggle the international language, Esperanto, must necessarily bear an important part. Just as the telegraph, the railroad and the steamship enable modern nations quickly to decide the issues of war between Russian Capital and Japanese Capital, so Esperanto will hasten by many years the decision of the contest between All Labor and AllCapital.

Although the original Communist Manifesto was written in German, the English edition, prepared by Engels, co-author with Marx, has been used as the basis of this translation and is herein reproduced on pages parallel with the Esperanto. Thus there is brought to the Esperanto student the opportunity to become familiar with the *fundamento* of the great political and economic struggle; and to the political student the occasion, while renewing acquaintance with a document he can never know too well, to learn the language in which our children shall write the Constitution of the World.

—*Arthur Baker*

FEB 23 1
LIBRARY
From the
Quarterly Journal

# ANTAŬPAROLO

La "Manifesto" estis publikigita kiel la principaro de la "Komunista Ligo," unu laborista asocio, unue ekskluzive germana, poste internacia, kaj, sekve de la politikaj kondiĉoj de la Kontinento antaŭ ol 1848, neeviteble sekreta societo. Ĉe kongreso de la Ligo, tenata en Londono en Novembro, 1847, Marks kaj Engels estis komisiitaj prepari por publikigado plenan teorian kaj praktikan programon de la partio. Verkita germanalingve en Januaro, 1848, la manuskripto estis sendita al la presisto en Londono kelkajn semajnojn antaŭ ol la franca revolucio de Februaro la 24'an. Franca traduko estis eldonita en Parizo, nelonge antaŭ ol la ribelo de Junio, 1848. La unua angla traduko, de Fraŭlino Helen Macfarlane, aperis en la *Red Republican* (Ruĝa Respublikano) de George Julian Harney, Londono, 1850. Dana kaj pola eldonaĵoj jam estis ankaŭ publikigitaj.

La malvenko de la Pariza ribelo de Junio, 1848—la unua granda batalo inter proletariaro kaj kapitalistaro—pelis ree en la malantaŭaĵon, kelkatempe, la socian kaj politikan aspirojn de la eŭropa laboranta klaso. De tiam, la batalado por supereco estis ree, kiel ĝi estis estinta antaŭ ol la revolucio de Februaro, sole inter diversaj

sekcioj de la poseda klaso; la laboranta klaso estis subpremata ĝis batalo por politika "kubutospaco," kaj al la loko de ekstrema flanko de la mezklasaj radikaloj. Kie ajn sendependaj proletariaj movadoj daŭrade montris signojn de vivo, ili estis senkompate ĉasataj ĝis morto. Tiel la prusa polico elĉasis la centran konsilantaron de la Komunista Ligo, tiam lokitan en Kolonjo. La membroj estis arestataj kaj, post dekok-monata mallibereco, ili estis juĝataj en Oktobro, 1852. Tiu ĉi fama "Kolonja Komunista Proceso" daŭris de Oktobro 4'an ĝis Novembro 12'an; sep el la arestitoj estis kondamnataj je periodoj de mallibereco en fortikaĵo, diversantaj de tri ĝis ses jaroj. Tuj post la kondamno la Ligo estis formale disigita de la membroj restantaj. Rilate al la "Manifesto," ĝi ŝajnis de tiu tempo esti destinita al tuta malapero.

Kiam la eŭropa laborklaso ree gajnis sufiĉe da forto por fari alian atakon kontraŭ la regantaj klasoj, la Internacia Asocio de Laboristoj ekkreskis. Sed tiu ĉi asocio, kreita kun la ekspresa celo fandi kune en unu korpon la tutan militantan proletariaron de Eŭropo kaj Ameriko, ne povis tuj proklami la principojn formulitajn en la "Manifesto." La Internacia estis devigata havi programon sufiĉe larĝan por esti akceptebla al la anglaj Metiaj Unuiĝoj, al la sekvantoj de Proudhon en Francujo, Belgujo, Italujo, kaj Hispanujo,

kaj la Lasalleanoj[1] en Germanujo. Marks, kiu elverkis tiun ĉi programon al la kontentigo de ĉiuj partioj, fidis tute al la intelekta plibonigado de la laboranta klaso, kiu estis certa rezulti de unuigita agado kaj reciproka diskutado. Eĉ la okazoj kaj malfacilaĵoj de la batalo kontraŭ Kapitalo, la malvenkoj eĉ pli multe ol la venkoj, ne povis ne memorigi la homajn spiritojn pri la nesufiĉeco de iliaj diversaj favorataj kuracilaĉoj, kaj preparadi la vojon por pli plena envido en la efektivajn kondiĉojn necesajn por laborklasa liberigado. Kaj Marks estis prava. La Internacia, ĉe sia disrompiĝo en 1874, lasis la laboristojn tute malsamaj homoj de tiuj, kiuj ĝi ilin trovis en 1864. Proudhonismo en Francujo, Lasalleanismo en Germanujo, estis elmortantaj kaj eĉ la konservativaj anglaj "Metiaj Unuiĝoj" kvankam la plimulto el ili de longtempe estis rompinta sian rilaton kun la Internacia, estis grade antaŭenirantaj al tiu punkto ĉe kiu, lastjare ĉe Svansea, ilia prezidanto povis diri je ilia nomo: "Kontinenta Socialismo estas perdinta siajn terurojn por ni." Laŭfakte, la principoj de la Manifesto faris konsiderindan antaŭenpuŝon inter laboristoj ĉiulandaj.

La Manifesto mem tiel ree venis al la antaŭo. La germana teksto estis, de

(1) Lasalle meme, al ni, ĉiam konfesis sin lernanto de Marks, kaj, kiel tia, staris sur la fondajo de la "Manifesto." Sed en sia publika agitado, 1860-64, li iris ne plu ol postuli kunfarajn laborejojn subtenatajn per la ŝtata kredito.

post 1850, represita kelkfoje en Svislando, Anglujo kaj Ameriko. En 1872 ĝi estis tradukata en la anglan lingvon en Nov-Jorko, kie la traduko estis publikigata en *Woodhull & Claflin's Weekly*. El tiu ĉi angla traduko unu franca estis farita en *Le Socialiste*, de Nov-Jorko. De tiam, almenaŭ du aliaj anglaj tradukoj, pli aŭ malpli multe hakitaj, estas eldonitaj en Ameriko, kaj unu el ili estas represita en Anglujo. La unua ruslingva traduko, farita de Bakounine, estis publikigata ĉe la de Herzen *Kolokol*'a eldonejo en Genevo, ĉirkaŭ 1863; dua, de la heroa Vera Zasulitch, ankaŭ en Genevo, 1882. Nova dana eldono estas trovata en *Socialdemokratisk Bibliothek*, de Kopenhago, jaro 1885; freŝa franca traduko en *Le Socialiste*, de Parizo, 1886. El tiu ĉi lasta hispana traduko estis preparata kaj eldonata en Madrido. 1886. La germanaj represaĵoj ne estas kalkulotaj; tute, estas estintaj almenaŭ dekdu. Armena traduko, kiu estis publikigota en Konstantinoplo antaŭ kelkaj monatoj, ne atingis, oni diras al mi, la lumon, ĉar la eldonisto timis eldoni libron surhavantan sur ĝi la nomon de Marks, dum samtempe la tradukinto rifuzis ĝin nomi sia propra produktaĵo. Pri pluaj tradukoj en aliaj lingvoj mi estas aŭdinta, sed ilin ne vidis. Tielmaniere, la historio de la Manifesto rebriligas, laŭ granda mezuro, la historion de la moderna laborklasa movado; nunatempe, ĝi sendube estas la plej larĝe

dissemata, la plej internacia produktaĵo el la tuta socialista literaturo, la komuna principaro konfesata de milionoj da laboristoj de Siberio ĝis Kalifornio.

Tamen, kiam ĝi estis skribita, oni ne povus ĝin nomi Socialista Manifesto. Per "socialistoj," en 1847, estis signataj, unuflanke, la aliĝantoj de la diversaj utopiaj sistemoj: Owenanoj en Anglujo, Fourieranoj en Francujo, ambaŭ el ili jam forvelkintaj ĝis stato de nuraj sektoj, kaj laŭgrade elmortintaj; ĉe la alia flanko, la plej svarmaĉantaj sociaj kuracistaĉoj, kiuj, per ĉiuj manieroj de riparaĉado, pretendis rimedi, sen ia danĝero al kapitalo aŭ profito, ĉiuspecajn sociajn maljustecojn, en ambaŭ okazoj homoj ekster la laborklasa movado, kaj sin turnantaj plimulte al la "edukitaj" klasoj por subtenado. Kia ajn parto de la laborklaso estis konvinkita pri la nesufiĉeco de nuraj politikaj revolucioj, kaj proklamis la necesecon de tuta socia ŝanĝo, tiu parto, tiam, sin nomis komunista. Ĝi estis kruda, elhakegita, entute instinkta speco de komunismo; tamen, ĝi tuŝis la plej gravan punkton kaj estis sufiĉe pova inter la laboranta klaso por produkti la utopian komunismon, en Francujo de Cabet, kaj en Germanujo de Veitling. Tiel, la socialismo estis, en 1847, mezklasa movado, la komunismo estante laborklasa movado. Socialismo estis, almenaŭ sur la Kontinento, "respektinda"; komunismo estis rekte mala. Kaj kiel nia ideo, de la

ekkomenco, estis ke "la liberigo de la laboranta klaso devegas esti la ago de la laboranta klaso mem," ne povis esti dubo rilate al tio, kiun el la du nomoj ni devis preni. Plue, ni ĉiam poste tute ne deziris ĝin malakcepti.

Ĉar la "Manifesto" estas nia kuna produktaĵo, mi opinias min devigata diri ke la fundamenta propozicio kiu estas ĝia esenca centraĵo, apartenas al Marks. Tiu propozicio estas: ke en ĉiu historia epoko, la plej ĝenerala modo de ekonomia produktado kaj interŝanĝado, kaj la socia organizo necese elkreskanta el ĝi, formiĝas kiel la fondaĵo sur kiu estas konstruata, kaj laŭ kiu sole povas esti klarigata la politika kaj intelekta historio de tiu epoko; ke, sekve, la tuta historio de la homaro (de la disiĝo de la primitiva genta societo, tenanta teron en komuna posedeco), estas historio de interklasaj bataladoj, konkuradoj inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, regantaj kaj subpremataj klasoj; ke la historio de tiuj ĉi interklasaj bataladoj estas serio evolucia en kiu, nunatempe, estas atingita punkto kie la ekspluatata kaj subpremata klaso—la proletariaro—ne povas atingi sian liberiĝon el la regado de la ekspluatanta kaj reganta klaso—la kapitalistaro—ne samtempe, unufoje por ĉiam, liberigante la tutan socion el ĉia ekspluatado, subpremado, interklasaj distingoj kaj interklasaj bataloj.

Tiun ĉi propozicion, kiu, laŭ mia opinio, destiniĝas fari por la historio kion la de Dar-

vin teorio estas farinta por la biologio, ni ambaŭ estis laŭgrade alproksimiĝintaj dum kelkaj jaroj antaŭ ol 1845. Kiom mi mem sendepende progresis al ĝi estas plej bone montrate en mia *Condition of the Working Class in England*.[1] Sed kiam mi ree renkontis Marks en Bruselo, printempe, 1845, li jam estis ĝin elpensinta, kaj metis ĝin antaŭ mi en terminoj preskaŭ tiel klaraj, kiel tiuj, per kiuj mi ĝin elmontras tie ĉi.

El nia kuna antaŭdiro je la germana eldono de 1872 mi citas la jenan:

"Kiom ajn la stato de aferoj estas ŝanĝinta dum la lastaj dudek-kvin jaroj, la ĝeneralaj principoj proponitaj en tiu ĉi Manifesto estas, laŭtute, tiel pravaj hodiaŭ kiel iam. Tie ĉi tie ia detalo povus esti plibonigita. La praktika aplikado de la principoj dependos, kiel diras la Manifesto mem, ĉiuloke kaj ĉiuokaze, de la historiaj statoj en tiu tempo ekzistantaj, kaj, pro tiu kaŭzo, nenia speciala emfazo estas metata al la revoluciaj rimedoj proponataj ĉe la fino de Sekcio IIa. Tiu parto estus, en multaj manieroj, redaktata tre malsame hodiaŭ. Konsiderante la gigantajn paŝegojn faritajn de Moderna Industrio de 1848, kaj la akompanantan plibonigitan kaj etenditan organizon de la laboranta klaso; en vido de la praktika sperto akirita, unue en la februara revolucio, kaj poste, ankoraŭ pli multe, en la Pariza Komunumo,

(1) "The Condition of the Working Class in England in 1844." De Frederiko Engels. Tradukita de Florence K. Wischnewetzky—London: Swan, Sonnenschein & Co.

kie la proletariaro por la unua fojo tenis politikan povon dum du tutaj monatoj, tiu ĉi programo en kelkaj detaloj estas fariĝinta antikva. Unu fakto aparte pruviĝis per la komunumo, t. e., ke "la laboranta klaso ne povas simple preni posedon de jam-farita ŝtata maŝinaro kaj ĝin uzi por siaj propraj celoj." (Vidu "*The Civil War in France; Address of the General Council of the International Workingmen's Association,*" eldonita London', Truelove, 1871, p. 15, en kiu tiu ĉi punkto estas plue klarigata). Plue, estas mem-evidente, ke la kritiko de la socialista literaturo estas manka rilate al la nuna tempo, ĉar ĝi nur pritraktas ĝis 1847; ankaŭ, ke la rimarkoj pri la rilatoj de la Komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj (Sekcio IV), kvankam laŭprincipe ankoraŭ pravaj, tamen en la praktiko estas antikvaj, ĉar la politika situacio estas tute ŝanĝita, kaj la progreso de la historio forbalais de la tero la plimulton el la politikaj partioj tie nome cititaj.

Sed jam, la Manifesto estas fariĝinta historia dokumento, kiun ni ne plu havas ian rajton ŝanĝi.

La jenan tradukon faris Sro. Samuel Moore, tradukinto de la pligranda parto da "Kapitalo," de Marks. Ni estas ĝin reviziintaj kune, kaj mi aldonis kelke da notoj klarigantaj la historiajn aludojn.

*Frederick Engels.*

Londono, 30'an de Januaro, 1888.

# MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

DE

KAROLO MARKS KAJ FREDERIKO ENGELS

---

FANTOMO vizitadas Eŭropon—la fantomo de la Komunismo. Ĉiuj povoj de malnova Eŭropo estas aliĝintaj sanktan interligon por trankviligi tiun ĉi fantomon; papo kaj caro, Metternich kaj Guizot, francaj radikalistoj kaj germanaj policaj spionoj.

Kie estas la partio de opozicio kiu ne estas nomaĉita kiel komunista de siaj kontraŭuloj regantaj? Kie la opoziciantaro kiu ne estas ĵetinta returnen la brulaĵantan riproĉon de Komunismo, kontraŭ la pli antaŭaj opoziciaj partioj tiel bone kiel kontraŭ siaj reakciaj kontraŭuloj?

Du aferoj rezultas el tiu ĉi fakto.

I. Komunismo estas jam konfesata de ĉiuj eŭropaj "povoj" esti "povo" ĝi mem.

II. Estas ja tempo kiam la Komunistoj devas malkaŝe, antaŭ la tuta mondo, publikigi siajn opiniojn, siajn celojn, siajn tendencojn, kaj kontraŭmeti al tiu ĉi infaneja fabelo pri la Fantomo de Komunismo ian Manifeston de la partio mem.

Al tiu celo, komunistoj de diversaj nacioj estas kunvenintaj en Londonon, kaj

verkis la sekvantan manifeston, publikigo, tan en la angla, franca, germana, itala, flandra kaj dana lingvoj.

# I

# LA KAPITALISTOJ KAJ LA PROLETARIOJ[1]

La historio de la tuta ĝisnun ekzistanta socio[2] estas la historio de interklasaj bataloj.

Liberulo kaj sklavo, patricio kaj plebejo, bienulo kaj servutulo, gildmajstro[3] kaj metiisto, unuvorte, subpremanto kaj subpremato, staris konstante unu kontraŭ la alia, daŭrigis senintermankan, jen kaŝatan, jen malkaŝatan bataladon, kiu ĉiufoje finiĝis,

---

(1) Per "kapitalistaro" estas signata la klaso de modernaj kapitalistoj, posedantoj de la rimedoj de socia produktado kaj dungantoj de salajra laboro; per "proletariaro," la klaso de modernaj salajr-laboristoj, kiuj, havante nenian propran rimedon de produktado, estas submetataj al la vendo de sia propra labor-povo por ke ili vivu.

(2) Tio estas, la tuta skribita historio. En 1847, la antaŭa historio de la socio, la socia organizo ekzistinta antaŭ la rekordita historio, estis preskaŭ nekonata. Post tiam, Haksthausen eltrovis komunan posedecon de la tero en Ruslando, Maurer pruvis ke ĝi estis la socia fondaĵo el kiu ĉiuj teŭtonaj rasoj ekkomencis en historio, kaj, iom poste, oni trovis ke vilaĝaj komunumoj estas, aŭ estis, la primitiva formo de la socio ĉie, de Hindujo ĝis Irlando. La interna organizo de tiu primitiva komunista socio estis nudigata, en sia tipa formo, per la fina eltrovo de Morgan, pri la reala naturo de la familiego (angle, gens) kaj ĝia rilato al la gento. Je la dissolvo de tiuj praaj komunumoj, la socio komencas esti diferencigata en apartajn kaj fine antagonismajn klasojn. Mi provis ree sekvi tiun ĉi dissolvadon en: "Der Ursprung der Familie des, Privateigenthums und des Staats," dua eldono, Stuttgart, 1886.

(3) Gildmajstro, tiu estas plena membro de gildo, majstro en, ne estro de, gildo.

aŭ en revolucia rekonstruado de la socio ĝenerale, aŭ en la komuna ruiniĝo de la batalantaj klasoj.

En la pli fruaj epokoj de la historio, ni trovas preskaŭ ĉie komplikigitan aranĝon de la socio en diversajn klasojn, multoblan gradigadon de socia viceco. En antikva Romo sin trovis patricioj, kaviliroj, plebejoj, sklavoj; en la mezepokoj, feŭdismaj sinjoroj, vasaloj, gildmajstroj, metiistoj, metilernantoj, servutuloj; en preskaŭ ĉiuj el tiuj klasoj, ree, estis filiaj gradigoj.

La moderna kapitalista socio kiu estas ekkreskinta el la ruinoj de la feŭda socio, ne estas foriginta klasajn antagonismojn. Ĝi nur starigis novajn klasojn, novajn statojn de subpremado, novajn formojn de batalado anstataŭ la malnovaj.

Nia epoko, la epoko de la kapitalistaro, posedas, tamen, tiun ĉi distingan econ—ĝi estas simpliginta la klasajn antagonismojn. La socio kiel tuto estas pli kaj pli sin dividanta en du grandajn malpacajn kampojn, en du grandajn klasojn rekte fronto fronton: kapitalistaro kaj proletariaro.

De la servutuloj de la mezepokoj ekkreskis la enrajtigitaj burĝoj de la unuaj urboj (*towns*). El tiuj ĉi burĝaroj la unuaj elementoj de la kapitalistaro kreskadis.

La eltrovo de Ameriko, la ĉirkaŭpaso de la Promontoro, malfermis freŝan teron al la supreniĝanta kapitalistaro. La orientindia kaj ĥina komercejoj, la koloniigado de Ameriko, interkomerco kun la kolonioj, la

kreskado de la rimedoj de interŝanĝo kaj de komercaĵoj ĝenerale, donis al komerco, al marveturado, al industrio, antaŭenpuŝon neniam antaŭe konatan, kaj per tio donis ankaŭ al la revolucia elemento en la ŝanceliĝanta feŭda socio rapidan disvolviĝon.

La feŭda sistemo de industrio, sub kiu la industria produktado estis monopoligita nun ne plu sufiĉas al la kreskantaj bezonoj de la novaj komercaj kampoj. La fabrikada sistemo prenis ĝian lokon. La gildmajstroj estis flanken ŝovitaj de la fabrikanta mezklaso; divido de laboro inter la diversaj enkorpigitaj gildoj estis anstataŭita per divido de laboro en ĉiu memstaranta laborejo.

Meztempe, la vendejaroj daŭre kreskis, la postuloj ĉiam pligrandiĝis. Eĉ la fabriko ne plu sufiĉis. Tiam, la vaporo kaj la maŝinaro revoluciigis la industrian produktadon. La fabrikado cedis lokon al la giganto, Moderna Industrio, kaj la industriaj mezklasoj estis anstataŭigitaj de industriaj milionuloj, estroj de tutaj industriaj armeoj, la moderna kapitalistaro.

Moderna industrio starigis la tutmondan vendejegon, al kiu la eltrovo de Ameriko pavimis la vojon. Tiu ĉi vendejego estas doninta grandegan disvolviĝon al komerco, al marveturado, kaj al komunikado surtera. Tiu ĉi disvolviĝo, en sia vico, reagis al la etendado de industrio; kaj proporcie kiel industrio, komercado, marveturado kaj fervojoj etendiĝis, laŭ tiu sama proporcio

la kapitalistaro kreskadis, pligrandigis sian kapitalon, kaj puŝis en la malantaŭon ĉiun klason restantan el la mezepokoj.

Ni vidas, tial, kiel la moderna kapitalistaro mem estas la produktaĵo de longa kurso de kreskado, de serio da revolucioj en la metodoj de produktado kaj interŝanĝo.

Ĉiu paŝo en la kreskado de la kapitalistaro estis akompanata de responda politika antaŭeniro de tiu klaso. Jen subpremata klaso sub la regado de la feŭda nobelaro, jen armita kaj mem-reganta klaso en la mezepoka komunumo[1], jen sendependa urba respubliko (kiel en Italujo kaj Germanujo), jen impostebla "tria etato" de la monarĥaĵo (kiel en Francujo), poste, dum la vera periodo de fabrikado, servante aŭ al la duon-feŭda aŭ al la absoluta monarĥaĵo kiel kontraŭbalancilo kontraŭ la nobelaro, kaj, laŭfakte, kiel la angul-ŝtonego de la grandaj monarĥaĵoj ĝenerale, la kapitalistaro estas fine, post la starigo de Moderna Industrio kaj la tutmonda vendejo, venkinta por si mem, en la moderna reprezenta ŝtato, ezsklusivan politikan regadon. La registaro de la moderna ŝtato estas nur komitato por administri la komunajn aferojn de la tuta kapitalistaro.

---

(1) "Commune" estas la nomo alprenita, en Francujo, de la naskiĝantaj urboj eĉ antaŭ ol ili pervenkis de siaj feŭdaj sinjoroj kaj regantoj lokan memregadon kaj politikajn rajtojn kiel "La Tria Etato." Generale parolante, rilate al la ekonomia disvolviĝo de la kapitalistaro, Anglujo estas tie ĉi alprenata kiel la tipa lando, kaj rilate al ĝia politika disvolviĝo, Francujo.

La kapitalistaro ludis, rilate al la historio, plej revolucian rolon.

La kapitalistaro, kie ajn ĝi atingis la superecon, finigis ĉiujn feŭdajn, patriarkajn, idiliajn rilatojn. Ĝi senkompate disrompis la multekarakterajn feŭdajn ligilojn kiuj ligis la homon al liaj "naturaj superuloj" kaj lasis restanta nenian alian ligilon inter homo kaj homo ol nuda mem-intereso, ol kala "kontanta pago." Ĝi dronigis la plej ĉielajn ekstazojn de religia fervoro, de kavalira entuziasmo, de filistra sentimentalismo, en la glacia akvo de egoista kalkulado. Personan indon ĝi ŝanĝis en komercan valoran, kaj anstataŭ la sennombraj neforpreneblaj alrajtigitaj liberecoj, ĝi starigis tiun solan, senrezonecan liberaĵon—Liberan Interkomercadon. En unu vorto, por ekspluatado, vualita per religiaj kaj politikaj iluzioj, ĝi anstataŭis senhontan, nudan, rektan, brutan ekspluatadon.

La kapitalistaro estas devestinta je ĝia lumkrono ĉiun okupon ĝisnune honoritan kaj alrigarditan kun reverenca respektego. Ĝi ŝanĝis la fizikiston, la leĝiston, la pastron, la poeton, la sciencistion, je siaj dungataj porsalaraj laborantoj.

La kapitalistaro devestis de la familio ĝian vualon sentimentalan, kaj redukciis la familian rilaton ĝis nur mona rilato.

La kapitalistaro estas elmontrinta kiel okazis ke tiu bruta elmontro de fortegeco en la mezepoko, kiun la reakcianoj tiel multe admiras, trovis sian taŭgan komple-

menton en la plej granda mallaboremeco. Ĝi estas la unua kiu montris kion povas okazigi la homa agemo. Ĝi faris miraĵojn grande superajn al egiptaj piramidoj, romaj akvokondukiloj kaj gotaj katedraloj; ĝi faris militirojn kiuj metis sub ombron ĉiujn antaŭajn elirojn de nacioj kaj krucmilitirojn.

La kapitalistaro ne povas ekzisti, ne konstante revoluciante la rimedojn de la produktado, kaj per tio la rilatojn de produktado, kaj kun ili la tutajn rilatojn de la socio. La konservado de la antikvaj metodoj de produktado en neŝanĝita formo estis, kontraŭe, la unua kondiĉo por la ekzistado de ĉiuj pli fruaj industriaj klasoj. Konstanta revoluciado de produktado, sen-interrompa maltrankviligo de ĉiuj sociaj statoj, ĉiama necerteco kaj agitado, distingas la kapitalistan epokon de ĉiuj pli fruaj. Ĉiuj fiksitaj, alglaciiĝitaj rilatoj, kun sia sekvantaro de antikvaj kaj respektegindaj antaŭjuĝoj kaj opinioj, forbalaiĝas, ĉiuj nove formitaj antikviĝas antaŭ ol ili povas povas malmoliĝi. Ĉio solida forfluidiĝas en aeron, ĉio sankta profaniĝas, kaj ĉe la fino la homo estas devigata stari kun sobraj sentoj antaŭ siaj realaj kondiĉoj de vivado, kaj siaj rilatoj kun sia gento.

La bezono de konstante etendiĝanta vendejo por siaj produktaĵoj ĉasas la kapitalistaron laŭ la tuta supraĵo de la terglobo. Ĝi devas nestiĝi ĉie, enlokiĝi ĉie, starigi interrilatojn ĉie.

Per sia ekspluatado de la komerca kampo

la kapitalistaro estas doninta kosmopolitan karakteron al produktado kaj konsumado en ĉiu lando. Je la granda ĉagreno de la reakcianoj, ĝi fortrenis el sub la piedoj de industrio la naciecan teron sur kiu ĝi staris. Ĉiuj jamlonge staritaj naciaj industrioj estas aŭ jam detruitaj aŭ nun ĉiutage detruataj. Ili estas elŝovitaj de novaj industrioj, kies enpreno fariĝas afero de vivo aŭ morto al ĉiuj civilizitaj nacioj, de industrioj kiuj ne plu ellaboras enlandan krudan materialon, sed krudan materialon entiritan el plej malproksimaj terzonoj; industrioj kies produktaĵoj estas konsumataj ne sole hejme, sed en ĉiu parto de la mondo. Anstataŭ la malnovaj bezonoj, satigataj de la produktaĵoj de la lando, ni trovas novajn bezonojn, postulantajn por sia satado la produktaĵojn de malproksimaj landoj kaj klimatoj. Anstataŭ la malnova loka kaj nacia memsufiĉeco, ni havas interrilatojn en ĉiun direkton, universalan interdependecon de nacioj. Kaj kiel en la materia, tiel ankaŭ en la intelekta produktado. La intelektaj kreaĵoj de individuaj nacioj fariĝas komuna propraĵo. Nacia unuflankeco kaj mallarĝanimeco fariĝas pli kaj pli multe neeblaj, kaj el la multaj naciaj kaj lokaj literaturoj leviĝas unu tutmonda literaturo.

La kapitalistaro, per la rapida plibonigo de ĉiuj iloj de produktado, per la grandege faciligitaj rimedoj de komunikado, entiras ĉiujn, eĉ la plej barbarajn naciojn, en

civilizacion. La malaltaj prezoj de siaj komercaĵoj estas la multepeza artilerio per kiu ĝi disbategas ĉiujn ĥinajn murojn, per kiu ĝi igas kapitulacii la treege obstinan malamon de la barbaroj al fremduloj. Ĝi devigas ĉiujn naciojn, je puno per ekstermo, alpreni la kapitalistan metodon de produktado; ĝi devigas ilin enkonduki en sian mezon tion kion ĝi nomas civilizacio, t. e. fariĝi mem kapitalisma. Unuvorte, ĝi kreas mondon laŭ sia propra figuro.

La kapitalistaro submetis la kamparon al la regado de la urboj. Ĝi kreis grandegajn urbojn, treege pligrandigis la loĝantaron urban rilate la kamparan, kaj tiamaniere estas elsavinta konsiderindan parton da la popolo el la idiotismo de kampara vivado. Ĝuste kiel ĝi igis la kamparon dependa de la urboj, tiel same ĝi igis barbarajn kaj duon-barbarajn naciojn dependaj de la civilizitaj, naciojn da kamparanoj dependaj de nacioj da kapitalistoj, la orienton de la okcidento.

La kapitalistaro daŭrigas pli kaj pli forigi la dissemitan staton de la loĝantaro, de la rimedoj de produktado, kaj de posedaĵo. Ĝi aglomeris la loĝantaron, centrigis la rimedojn de produktado, kaj koncentrigis la posedaĵojn en malmultajn manojn. La necesa sekvo de tio ĉi estis politika centrigado. Sendependaj, aŭ neforte kunligitaj provincoj, kun apartaj interesoj, leĝoj, registaroj kaj sistemoj de impostado, kune amasiĝis en unu nacion, kun unu

registaro, unu sistemo de leĝoj, unu nacia klasa intereso kaj unu sistemo de enportaj impostpagoj.

La kapitalistaro, dum sia apenaŭ centjara regado, estas kreinta pli masivajn kaj pli kolosajn produktantajn povojn ol kreis ĉiuj antaŭaj generacioj entute. Subjugado de la povoj de naturo al la homoj, maŝinaro, la aplikado de la ĥemio al la industrio kaj la terkulturo, vapora marveturado, la fervojoj, elektra telegrafo, la pretigado de tutaj kontinentoj al kulturado, kanaligo de riveroj, tutaj loĝantaroj elsorĉigitaj el la tero—kiu antaŭa centjaro havis eĉ antaŭsenton ke tiaj produktemaj povoj dormis en la patrina teno de la socia laboro?

Ni vidas do: la rimedoj de produktado kaj interŝanĝado sur kies fondaĵo la kapitalistaro sin elkonstruis estis naskitaj en la feŭda socio. Ĉe difinita punkto en la disvolviĝo de tiuj rimedoj de produktado kaj interŝanĝado, la kondiĉoj sub kiuj la feŭda socio produktis kaj interŝanĝis, la feŭda organizo de terkulturado kaj la fabrika industrio, unuvorte la feŭda rilatoj de propreco, fariĝis ne plu kunigeblaj kun la jam disvolvitaj produktaj povoj; ili fariĝis tiom multe da katenoj. Ili devegis esti disrompataj; ili estis disrompitaj.

En iliajn lokojn ekpaŝis libera konkurado, akompanata de socia kaj politika konstitucio alfarita al ĝi, kaj de la ekonomia kaj politika regado de la kapitalista klaso.

Simila movado nun estas okazanta antaŭ niaj propraj okuloj. La moderna kapitalista socio kun siaj rilatoj de produktado, de interŝanĝado kaj de posedeco, socio kiu elsorĉigis tiel gigantajn rimedojn de produktado kaj de interŝanĝado, similas sorĉiston, kiu ne plu povas kontroli la povojn de la suba mondo kiujn li suprenvokis per siaj sorĉaĵoj. Dum multaj jardekoj estintaj la historio de industrio kaj komercado estis nur la historio de la ribelado de modernaj produktantaj povoj kontraŭ la modernaj kondiĉoj de produktado, kontraŭ la posedaj rilatoj kiuj estas la kondiĉoj por la ekzistado de la kapitalistaro kaj por ĝia regado. Estas sufiĉe citi la komercajn krizojn, kiuj per sia perioda reveno metas al juĝo, ĉiufoje pli minace, la ekziston de la tuta kapitalista socio. En tiuj ĉi krizoj, granda parto ne sole de la ekzistantaj produktaĵoj, sed ankaŭ de la antaŭe kreitaj produktantaj povoj, periode detruiĝas. En tiuj krizoj, ekdisvastiĝas epidemio, kiu en ĉiuj pli fruaj epokoj, estus ŝajninta absurdaĵo—la epidemio de troproduktado. La socio subite sin trovas remetita en staton de momenta barbarismo; ŝajnas kvazaŭ malsufiĉeco de nutraĵo, universala milito detruegada, forfermis la provizon de ĉiu rimedo de nutrado; industrio kaj komerco ŝajnas detruitaj; kaj kial? Ĉar estas tro multe da civilizacio, tro multe da vivrimedoj, tro multe da industrio, tro multe da komerco. La produktantaj povoj je la dis-

pono de la socio ne plu sin direktas al la disvolvigo de la kondiĉoj de kapitalista posedeco; kontraŭe, ili estas fariĝintaj tro povaj por tiuj ĉi kondiĉoj, per kiuj ili estas katenataj, kaj tuj kiam ili demetas tiujn ĉi katenojn ili alportas malordon al la tuta kapitalista socio, endanĝerigante la ekziston de kapitalista propreco. La kondiĉoj de kapitalista socio estas tro mallarĝaj por enteni la riĉaĵon de ĝi kreitan. Kaj kiamaniere la kapitalistaro trapasas tiujn krizojn? Unuflanke, per la perfortigata detruo de amaso da produktantaj povoj; je la alia flanko, venkante novajn vendejojn, kaj pli plene ekspluatante la malnovajn. Tio estas, pavimante la vojon al pli grandaj kaj pli detruaj krizoj, kaj plimalgrandigante la rimedojn per kiuj la krizoj estas malhelpataj.

La armiloj per kiuj la kapitalistaro faligis teren la feŭdismon nun estas turnataj kontraŭ la kapitalistaro mem.

Sed ne sole estas la kapitalistaro forĝinta la armilojn kiuj alportas la morton al ĝi mem; ĝi ankaŭ vokis en ekziston la homojn kiuj tiujn armilojn estas uzontaj—la modernan laborklason—la proletariojn.

Proporcie kiel la kapitalistaro, t. e., la kapitalo, disvolviĝas, laŭ tiu sama proporcio disvolviĝas la proletariaro, la moderna laborklaso, klaso de laboristoj, kiuj vivas nur tiel longe kiel ili trovas laboron, kaj kiui trovas laboron nur tiel longe kiel ilia laboro kreskigas kapitalon. Tiuj laboristoj,

kiuj devegas sin vendi pece, estas komercaĵo, kiel ĉiu alia komercaĵo, kaj sekve estas almetataj al ĉiuj malfacilaĵoj de la konkurado, al ĉiuj ŝanĝoj de la vendejaj prezoj.

Sekve de la vasta uzado de la maŝinaro kaj de la divido de laborado, la laboro de la proletarioj estas perdinta ĉian individuan karakteron, kaj ĉian ĉarmon por la laboristo. Li fariĝas pendaĵo de la maŝino, kaj nur la plej simpla, plej unutona, kaj plej facile akirebla lertaĉo estas postulata de li. De tio, la kosto por produkti laboriston estas limigata, preskaŭ tute, al la rimedoj de vivado kiujn li postulas por sia subtenado, kaj por la daŭrigado de sia raso. Sed la prezo de ia komercaĵo, kaj ankaŭ de la laboro, estas egala kun ĝia kosto de produktado. Laŭ proporcio, tial, kiel la malagrablegeco de la laboro pligrandiĝas, la salajro malkreskas. Ne, plu; proporcie kiel la uzado de maŝinoj kaj la dividado de laboro kreskas, laŭ tiu sama proporcio la ŝarĝo de laboro ankaŭ kreskas, ĉu per plilongigo de la labortempo, per pligrandigo de la laboro farata en certa tempo, ĉu per pligrandigita rapido de maŝinaro, k.c.

La moderna industrio estas elŝanĝinta la malgrandan laborejon de la patriarka majstro je la granda fabrikejo de la industria kapitalisto. Aroj da laboristoj, amasigitaj en la fabrikejon, organiziĝas kiel soldatoj. Kiel soldatoj de la industria armeo, ili estas metataj sub la komandado de vera hierarĥio

de oficiroj kaj serĝentoj. Ne nur ili estas sklavoj de la kapitalista klaso, kaj de la kapitalista ŝtato; ili estas ĉiutage kaj ĉiuhore sklavigataj de la maŝino, de la superulo, kaj, super ĉiuj, de la individua kapitalista fabrikanto mem. Ju pli malkaŝe tiu ĉi despotismo proklamas la profiton kiel sian celon, des pli malgrandaĉa, des pli malaminda kaj pli maldolĉiganta ĝi estas.

Ju pli malmulte da lerteco kaj laboro aŭ forto estas postulata en mana laboro, alivorte, ju pli multe la moderna industrio disvolviĝas, des pli multe la laboro de viroj estas anstataŭata de tiu de virinoj. Diversecoj de aĝo kaj sekso ne plu havas klaran socian efikecon por la laboranta klaso. Ĉiuj estas iloj de laboro, pli aŭ malpli multekostaj por uzi, laŭ aĝo kaj sekso.

Tuj kiam la ekspluatado de la laboristo sub la manoj de la fabrikanto atingas finon ĝis tiu grado kie li ricevas sian pagon en kontanto, li estas atakata de la aliaj sekcioj de la kapitalistaro, la domluanto, la magazenisto, la pruntisto, k. t. p.

La malsupra tavolo de la meza klaso—la negrandaj komercistoj, vendejistoj, kaj eksiĝintaj komerculoj ĝenerale, la metiistoj kaj farmistoj—ĉiuj ĉi tiuj grade malleviĝas en la proletariaron, parte ĉar ilia eta kapitalo ne estas sufiĉa por la skalo laŭ kiu la moderna industrio estas administrata, kaj subiĝas en la konkurado kun la grandaj kapitalistoj; parte ĉar ilia specialigita lerteco estas farata senvalora per novaj meto-

doj de produktado. Tiel la proletariaro rekrutiĝas el ĉiuj klasoj de la popolo.

La proletariaro trapasas diversajn gradojn de disvolviĝo. De ĝia naskiĝo komencas ĝia batalado kontraŭ la kapitalistaro. Unue, la konkuro estas subtenata de individuaj laboristoj, poste de la gelaborantoj en ia fabrikejo, tiam de la metiistoj de unu metio, en unu loko, kontraŭ la individua kapitalisto kiu rekte ilin ekspluatas. Ili direktas siajn atakojn ne kontraŭ la kapitalismaj kondiĉoj de produktado, sed kontraŭ la iloj mem de produktado ; ili detruas enportitajn komercaĵojn kiuj konkuras kun ilia laboro, ili pece rompegas maŝinojn, ili ekbruligas fabrikejojn ; ili provas restarigi perforte la malaperintan staton de la laboristo de la mezepoko.

Ĉe tiu ĉi grado la laboristoj ankoraŭ formas neinterligitan mason, dissematan tra la tuta lando, kaj disrompatan per sia reciproka konkurado. Se ie ili kuniĝas por formi pli kompaktajn korpojn, tiu ĉi ne estas ankoraŭ la sekvo de ilia agema unuiĝo, sed de la unuiĝo de la kapitalistaro, kiu klaso, por atingi siajn proprajn politikajn celojn, devegiĝas ekmovigi la tutan proletariaron, kaj plue, ankoraŭ dum kelka tempo povas tiel fari. Ĉe tiu ĉi punkto, tial, la proletarioj ne atakas siajn malamikojn, sed la malamikojn de siaj malamikoj, la restaĵojn de absoluta monarĥeco, la terposedantojn, la neindustrian kapitalistaron, la kapitaletulojn. Tiel la tuta historia

movado koncentriĝas en la manojn de la kapitalistaro; ĉiu venko tiel atingata estas venko por la kapitalistaro.

Sed kun la disvolviĝo de la industrio la proletariaro ne sole kreskadas nombre; ĝi koncentriĝas en pli grandajn masojn, ĝia povo kreskas, kaj ĝi sentas tiun povon pli multe. La diversaj interesoj kaj statoj de vivado inter la vicoj de la proletariaro pli kaj pli multe egaliĝas, proporcie kiel la maŝino neniigas ĉiujn distingojn de laboro, kaj preskaŭ ĉie mallevas salajrojn ĝis la unu malalta nivelo. La kreskanta konkurado inter la kapitalistoj, kaj la rezultantaj komercaj krizoj, igas la salajrojn de la laboristoj ĉiam pli ŝanĝemaj. La senĉesa plibonigo de la maŝinaro, ĉiam pli rapide disvolviĝante, igas ilian vivrimedojn pli kaj pli necertaj; la kolizioj inter individuaj laboristoj kaj individuaj kapitalistoj prenas pli kaj pli multe la karakteron de kolizioj inter du klasoj. Tiaokaze, la laboristoj komencas formi kombinaĵojn (metiaj unuiĝoj) kontraŭ la kapitalistoj; ili kune klubiĝas por subteni la salajrajn prezojn; ili fondas daŭrajn asociojn por fari antaŭtempe provizojn por tiuj ĉi okazaj ribeloj. Tie ĉi tie la konkuro elrompas kiel malordegoj.

Kelkafoje la laboristoj venkas, sed nur dum iom da tempo. La efektiva frukto de iliaj bataloj konsistas ne en la tuja rezultato, sed en ia ĉiame vastiĝanta unuiĝo de la laboristoj. Tiu ĉi unuiĝo estas helpata de

la plibonigataj rimedoj de komunikado kreataj de la moderna industrio, kiuj metas la laboristojn de diversaj lokoj en reciprokan kontakton. Precize tiu ĉi kontakto estis bezonata por centrigi la multenombrajn lokajn batalojn, ĉiuj de la sama karaktero, en unu nacian bataladon inter klasoj. Sed ĉiu klasa batalado estas politika batalado. Kaj tiun unuecon, por kies atingo la burĝoj de la mezepokoj, kun siaj malbonegaj vojoj, postulis jarcentojn, la modernaj proletarioj, dankon al fervojoj, atingas en kelke da jaroj.

Tiu ĉi organizado de la proletarioj en klason, kaj sekve en politikan partion, estas konstante ree renversata per konkurado inter la laboristoj mem. Sed ĝi ĉiam releviĝas, pli forta, pli fortika, pli povega. Ĝi devigas leĝfaran konfeson de specialaj interesoj de la laboristoj, kaptante helpon el la dividoj inter la kapitalistaro mem. Tiel, la dek-hora leĝo en Anglujo estis farata.

Tute, la koliziojn inter la du klasoj de la malnova socio antaŭenigas, laŭ multaj manieroj, la kurson de disvolviĝo de la proletariaro. La kapitalistaro sin trovas envolvita en konstanta batalo. Unue, kontraŭ la aristokrataro; poste, kontraŭ tiuj porcioj de la kapitalistaro mem, kies interesoj fariĝis kontraŭaj al la progreso de industrio; ĉiame, kontraŭ la kapitalistaro de fremdaj landoj. En ĉiuj ĉi tiuj bataloj ĝi sin trovas devigata petegi al la proletar-

iaro, peti ĝian helpon, kaj tiel treni ĝin en la politikan arenon. La kapitalistaro mem, provizas al la proletariaro siajn proprajn elementojn de politika kaj ĝenerala edukado, alivorte, ĝi provizas al la proletariaro armilojn por batalado kontraŭ la kapitalistaro.

Plue, kiel ni jam vidis, tutaj sekcioj de la regantaj klasoj estas, per la antaŭenirado de la industrio, ekpuŝataj en la proletariaron, aŭ almenaŭ minacataj en siaj kondiĉoj de vivado. Tiuj samaj ankaŭ provizas al la proletariaro freŝajn elementojn de klerigado kaj progresado.

Fine, dum tempoj kiam la klasa batalado alproksimiĝas la horon decidan, la dissolvado okazanta en la reganta klaso, laŭvere en la tuta vicaro de la malnova socio, prenas sur sin tiel bataleman, helegan karakteron ke malgranda sekcio de la reganta klaso detranĉas sin kaj aliĝas al la revoluciema klaso, la klaso kiu tenas en siaj manoj la estontaĵojn. Ĝuste kiel, tial, en pli frua periodo, sekcio el la nobelaro alpasis al la kapitalistaro, tiel nun porcio el la kapitalistaro transpasas al la proletariaro, kaj, speciale, porcio el la kapitalismaj teoristoj, kiuj estas sin levintaj al nivelo de teoria kompreno de la historiaj movoj kiel tuto.

El ĉiuj la klasoj kiuj staras vizaĝo ĉe vizaĝo kun la kapitalistaro hodiaŭ, la proletariaro sole estas revoluciema klaso. La aliaj klasoj velkas kaj fine malaperas antaŭ

la marŝo de moderna industrio; la proletariaro estas ĝia aparta kaj esenca produktaĵo.

La malsupra mezklaso, la malgranda fabrikanto, la vendejisto, la metiisto, la kamparano, ĉiuj ĉi tiuj batalas kontraŭ la kapitalistaro por savi de estingo sian ekziston kiel frakcioj de la meza klaso. Ili tial ne estas revoluciaj, sed konservativaj. Ne, plue, ili estas reakciaj, ĉar ili provas ruligi malantaŭen la radon de la historio. Se per ŝanco ili estas revoluciemaj, ili estas tiaj nur je la vido al sia okazonta transmeto en la proletariaron; ili tial defendas ne siajn nunajn, sed siajn estontajn interesojn; ili forlasas sian propran vidpunkton por sin meti en la proletariaran.

Tiu "danĝera klaso," la socia feĉaĉo, tiu malageme putranta maso forĵetata de la plej malsupraj tavoloj de la malnova socio, eble, tie ĉi tie, estos enbalaata en la movadon de proletariara revolucio; ĝiaj vivkondiĉoj, tamen, tre pli multe ĝin preparas por rolo de dungita ilo de reakcia intrigo.

En la kondiĉoj de la proletariaro, tiuj de malnova socio ĝenerale estas jam praktike submetitaj. La proletario estas sen propraĵo; lia rilato kun sia edzino kaj infanoj havas ne plu ion komunan kun la kapitalistaj familiaj rilatoj; moderna industria laboro, moderna submetado al kapitalo, tiel same en Anglujo kiel en Francujo, en Ameriko kiel en Germanujo, estas nudigintaj lin je ĉia signeto de nacia karaktero. Leĝo, moraleco, religio, estas por li tiom multaj

kapitalistaj antaŭjuĝoj, post kiuj embuskiĝas ĝuste tiom da kapitalistaj interesoj.

Ĉiuj antaŭirantaj klasoj kiuj atingis la superecon, provis fortikigi sian jam atingitan staton per la submetado de la ĝenerala socio al siaj kondiĉoj de alproprigado. La proletarioj ne povas fariĝi mastroj de la produktantaj povoj de la socio, escepte per forigo de sia propra antaŭa metodo de alproprigado, kaj per tio ankaŭ de ĉiu alia antaŭa metodo de alproprigado. Ili havas nenion propran por gardi kaj fortikigi; ilia funkcio estas detrui ĉiujn antaŭajn gardilojn kaj certigilojn de individua propreco.

Ĉiuj ĝisnunaj movadoj historiaj estis movadoj de malplimultoj, aŭ por la intereso de malplimultoj. La proletaria movado estas la memkonscia, nedependa movado de la grandega plimulto, por la intereso de la grandega plimulto. La proletariaro, la plej malsupra tavolo de nia nuna socio, ne povas ekmovi, ne povas sin levi ne ĵetante aeren la tutan superkuŝantan tavolon de la oficiala socio.

Kvankam ne laŭ substanco, tamen laŭ formo, la batalado de la proletariaro kun la kapitalistaro estas, komence, nacia batalado. Unue el ĉio, la proletariaro de ĉiu lando devegas, kompreneble, fini aferojn kun sia propra kapitalistaro.

Elmontrante la plej ĝeneralajn fazojn de la disvolviĝo de la proletariaro, ni montris la pli aŭ malpli vualatan internan militon, okazantan en ekzistanta socio, ĝis punkto

kie tiu milito elrompas en malkaŝatan revolucion, kie la perforta renverso de la kapitalistaro preparas la fondaĵon por la regado de la proletariaro.

Ĝisnune, ĉiu formo de la socio estas fondita, kiel ni jam vidis, sur la antagonismo inter subpremantaj kaj subpremataj klasoj. Sed por subpremi klason, certaj kondiĉoj devegas esti certigataj al ĝi, laŭ kiuj ĝi povas almenaŭ daŭrigi sian sklavan ekziston. La servutulo, dum la periodo de servuteco, sin levis al membriĝo en la komunumo, ĝuste kiel la kapitaletulo, sub la jugo de feŭda absolutismo, disvolviĝis en kapitaliston. Male, la moderna laboristo, anstataŭ leviĝi kun la progreso de la industrio, malleviĝas pli kaj pli profunde sub la kondiĉoj de ekzistado de sia propra klaso. Li fariĝas senhavulo, kaj senhaveco kreskas pli rapide ol la loĝantaro kaj riĉeco. Kaj tie ĉi evidentiĝas ke la kapitalistaro ne taŭgas esti iel plu la reganta klaso en la socio, kaj altrudi siajn kondiĉojn de ekzistado al la socio kiel superrajdanta leĝo. Ĝi ne taŭgas por regadi, ĉar ĝi ne povas certigi al sia sklavo ekzistadon en lia sklaveco, ĉar ĝi ne povas malhelpi lian malleviĝon en tian staton ke ĝi devegas lin nutri, anstataŭ esti nutrata de li. La socio ne plu povas vivi sub tiu ĉi kapitalistaro; alivorte, ĝia ekzistado ne plu kongruas kun la socio.

La esenca kondiĉo por la ekzistado, kaj por la regado de la kapitalista klaso, estas

la kreado kaj kreskado de kapitalo; la kondiĉo por kapitalo estas dungata laboro. Dungata-laboro staras ekskluzive sur konkurado inter la laboristoj. La antaŭeniro de la industrio, kies nevola puŝanto estas la kapitalistaro, anstataŭas la izolecon de la laboristoj, la sekvo de konkurado, per ilia nevola kuniĝo, la sekvo de asociado. La disvolviĝo de la moderna industrio, tial, detrenas de sub ĝiaj piedoj eĉ la fondaĵon sur kiu la kapitalistaro produktas kaj alproproprigas produktaĵojn. Tial, tio kion la kapitalistaro produktas estas, antaŭ ĉio, ĝiaj propraj tombistoj. Ĝia falo kaj la venko de la proletariaro estas egale neeviteblaj.

## II.

## PROLETARIOJ KAJ KOMUNISTOJ.

En kia rilato staras la komunistoj al la proletarioj kiel tuto?

La komunistoj ne estas aparta partio opozicianta aliajn laborklasajn partiojn.

Ili havas neniajn interesojn apartajn el tiuj de la tuta proletariaro.

Ili ne starigas sektajn principojn siajn laŭ kiuj formi kaj modeli la proletarian movadon.

La komunistoj estas distingataj el la aliaj laborklasaj partioj nur per tiu ĉi:
1. En la naciaj bataladoj de la proletarioj de diversaj landoj, ili elmontras kaj portas al la fronto la komunajn interesojn de

la tuta proletariaro, nedepende de ĉia nacieco. 2. En la diversaj gradoj de disvolviĝado tra kiuj la batalado de la laborklaso kontraŭ la kapitalistaro devegas pasi, ili ĉiam kaj ĉie reprezentadas la interesojn de la movado kiel unu tuto.

La komunistoj tial estas, unuflanke, praktike la plej antaŭa kaj decidema sekcio el la laborklasaj partioj en ĉiu lando, tiu sekcio kiu puŝas antaŭen ĉiujn aliajn; aliflanke, teorie, pli ol la granda masego de la proletariaro ili posedas tiun ĉi helpilon—ili klare komprenas la vojon de la marŝo, la kondiĉojn, kaj la finajn ĝeneralajn rezultatojn de la proletaria movado.

La tuja celo de la komunistoj estas tia sama kiel tiu de ĉiuj aliaj proletariaraj partioj: formado de la proletariaro en klason, renverso de kapitalista supereco, ekkapto de politika povo de la proletariaro.

La teoriaj konkludoj de la komunistoj neniel estas fondataj sur ideoj aŭ principoj kiuj estas elpensitaj, aŭ eltrovitaj, de unu aŭ alia kiu volas esti universala reformisto.

Ili nur esprimas, en ĝeneralaj terminoj, efektivajn rilatojn kreskantajn el ekzistanta interklasa batalado, el historia movado okazanta vere antaŭ niaj okuloj. La forigo de ekzistantaj proprecaj rilatoj tute ne estas distinga karakteraĵo de komunismo.

Ĉiuj proprecaj rilatoj estintaj estas

ĉiam regitaj de historia ŝanĝo, sekve de la ŝanĝado en historiaj kondiĉoj.

La Franca Revolucio, ekzemple, forigis feŭdan proprecon, anstataŭigante kapitalistan proprecon.

La distinganta eco de komunismo ne estas la forigo de propreco ĝenerale, sed la forigo de kapitalista propreco. Sed moderna kapitalista privata propraĵo estas la fina kaj plej perfekta esprimo de la sistemo por la produktado kaj alproprigo de produktaĵoj, fondita sur klasaj antagonismoj, la ekspluatado la multajn de la malmultaj.

Laŭ tiu ĉi senco la teorio de la komunistoj povas sumiĝi en unu frazo: Forigo de privata propreco.

Ni komunistoj estas riproĉitaj je la deziro forigi la rajton de la individua akirado de posedaĵo kiel la frukto de la propra laboro de homo, kiu posedaĵo, oni pretendas, estas la fondaĵo de ĉia persona libereco, agemo kaj sendependeco.

Malfacile-gajnita, persone akirita, mem perlaborita posedaĵo! Ĉu vi priparolas la propraĵon de la malgranda metiisto kaj de la farmisto, formon de posedaĵo kiu antaŭdatas la kapitalistan formon? Ne estas bezone tiun forigi; la disvolviĝo de la industrio jam estas ĝin detruinta, laŭ granda mezuro, kaj ankoraŭ ĉiutage ĝin detruas.

Aŭ ĉu vi priparolas modernan kapitalistan posedaĵon?

Sed ĉu dungata laboro kreas ian propraĵon

por la laboristo? Ne unu peceton. Ĝi kreas kapitalon, t. e., tiun specon de posedaĵo kiu ekspluatas dungatan laboron, kaj kiu ne povas kreski sen la kondiĉo ke ĝi ricevu novan provizon da dungata laboro por freŝa ekspluatado. Posedaĵo, en sia nuna formo, fondiĝas sur la antagonismo inter kapitalo kaj salajra laboro. Ni ekzamenu ambaŭ flankojn de tiu ĉi antagonismo.

Esti kapitalisto, estas havi ne sole tute personan, sed socian etaton en produktado. Kapitalo estas kolektiva produktaĵo, kaj nur per la kuna agado de multaj membroj—ne, je la fina analizo, nur per la kuna agado de ĉiuj membroj de la socio—ĝi povas moviĝi.

Kapitalo, tial, ne estas persona, ĝi estas socia povo.

Tial, kiam kapitalo ŝanĝiĝas al komuna posedaĵo, al la propraĵo de ĉiuj membroj de la socio, persona posedaĵo ne estas tial aliformita al socia posedaĵo. Nur la socia karaktero de la posedaĵo estas ŝanĝata. Ĝi perdas sian klasan karakteron.

Ni nun konsideru dungan laboron.

La meza prezo de dunga laboro estas la minimuma salajro, t. e. tiu kvanto de la rimedoj de nutrado kiu estas absolute necesa por subteni la laboriston en nura ekzistado kiel laboristo. Tial, tio kion la laboristo alpropriĝas al si per sia laboro, nur sufiĉas por daŭrigi kaj reprodukti nuran ekzistadon. Ni neniel intencas for-

igi tiun ĉi personan alproprigadon de la produktaĵoj de laboro, alproprigado kiu estas farata por la subtenado kaj reproduktado de homa vivo, kaj kiu lasas nenian restaĵon per kiu ordoni al si la laboron de aliaj. Ĉio kion ni deziras forigi estas la mizeran karakteron de tiu ĉi alproprigado, laŭ kiu la laboristo vivadas nur por pligrandigi kapitalon, kaj estas permesata vivi nur tiel multe kiel la interesoj de la reganta klaso ĝin postulas.

En kapitalista socio, vivanta laboro estas nur rimedo por pligrandigi amasigitan laboraĵon. En komunista socio, amasigita laboraĵo estas nur rimedo por plilarĝigi, riĉigi, promocii la ekziston de la laboristo.

En kapitalista socio, tial, la estinteco kontrolas la estantecon; en komunista socio la estanteco kontrolas la estintecon. En kapitalista socio kapitalo estas nedependa kaj havas individuecon, dum la viva persono dependas kaj ne havas individuecon.

Kaj la forigo de tiu ĉi stato de aferoj estas nomata de la kapitalistaro: forigo de individueco kaj libereco! Kaj prave tiel. La forigo de kapitalista individueco, kapitalista nedependeco, kaj kapitalista libereco certe estas alcelata.

Per "libereco" estas signataj, sub la nunaj kapitalistaj kondiĉoj de produktado, libera komercado, liberaj vendado kaj aĉetado.

Sed se la vendo kaj aĉeto malaperas, liberaj vendado kaj aĉetado ankaŭ malaperas. Tiu ĉi dirado pri liberaj vendado kaj

aĉetado, kaj la aliaj "bravaj vortoj" de nia kapitalistaro pri libereco ĝenerale, havas signifon, se ian, nur per kontrasto kun la limigitaj vendado kaj aĉetado, kun la katenitaj komercistoj de la mezepokoj, sed havas nenian signifon rilate la komunistan forigon de la vendo kaj aĉeto, de la kapitalistaj kondiĉoj de produktado, kaj la kapitalistaro mem.

Vi estas terurigata de nia intenco forigi la privatan propraĵon. Sed en via ekzistanta socio, privata propraĵo jam estas forigita al naŭ dekonoj de la loĝantaro; ĝia ekzisto por la malmulto estas sole ŝuldata al ĝia neekzisto en la manoj de tiuj naŭ dekonoj. Vi nin riproĉas, tial, je la intenco forigi formon de propraĵo, la necesa kondiĉo por kies ekzistado estas la neekzistado de ia propraĵo por la granda plimulto da la socio.

Unuvorte, vi riproĉas nin je la intenco forigi vian propraĵon. Precize tiel; tio estas ĝuste kion ni intencas.

De tiu momento kiam laboro ne plu povas esti ŝanĝata en kapitalon, monon, lupagon, en socian povon kiu estas monopoligebla, t. e., de la momento kiam individua propraĵo ne plu povas esti aliformigata en kapitalistan propraĵon, en kapitalon, de tiu momento, vi diras, individueco malaperas.

Vi devas, tial, konfesi ke per "individuo" vi parolas pri neniu alia persono ol la kapitalistaro, ol la mezklasa posedanto

de proprajo. Tiu ĉi persono ja devas esti forbalaata de la vojo, kaj neebligata.

Komunismo deprenas de neniu homo la povon alproprigi la produktajojn de la socio; ĉio kion ĝi faras estas depreni de li la povon subjugigi la laboron de aliaj personoj per tia alproprigo.

Estas kontraŭdirite, ke je la forigo de privata propreco ĉia laboro ĉesos, kaj universala mallaboremo nin kaptos.

Laŭ tiu ĉi, kapitalista socio jam longe antaŭe devis "iri al la hundoj" per tuta mallaboremo; ĉar tiuj el ĝiaj anoj kiuj laboras, nenion akiras, kaj tiuj kiuj ion akiras, ne laboras. La tuto de tiu ĉi kontraŭdiro estas nur alia esprimo de la ripetajo: ke ne povos esti plu ia salajra laboro, kiam ne plu estos iom da kapitalo.

Ĉiuj kontraŭdiroj faritaj kontraŭ la komunista metodo por la produktado kaj alproprigado de materiaj produktajoj, sammaniere estas faritaj kontraŭ la komunistaj metodoj por produkti kaj alproprigi intelektajn produktajojn. Ĝuste kiel, al la kapitalistaro, la malapero de klasa propreco estas la malapero de produktado mem, tiel la malapero de klasa kulturo estas por ili identa kun la malapero de ĉia kulturo.

Tiu kulturo, kies perdon li tiel multe bedaŭras, estas, por la granda plimulto, nur dresado por agi kiel maŝino.

Sed ne malpacu kun ni tiel longe kiel vi aplikas al nia intencata forigo de kapitalista

propreco la mezurilon de viaj kapitalistaj ideaĉoj pri la libereco, la kulturo, la leĝo, k. t. p. Eĉ viaj ideoj estas nur la elkreskaĵo el la kondiĉoj de via kapitalista produktado kaj kapitalista propreco, ĝuste kiel via juĝsistemo estas nur la volo de via klaso enleĝigitaj por ĉiuj, volo kies esenca karaktero kaj direkto estas determinataj per la ekonomiaj kondiĉoj de ekzisto de via klaso

La egoista malkompreno kiu logas vin aliformigi en eternajn leĝojn de naturo kaj rezono la sociajn formojn elkkreskantajn el via nuna metodo de produktado kaj formo de propraĵo—historiaj rilatoj kiuj aperas kaj malaperas en la progreso de produktado—tiun malkomprenon vi havas kune kun ĉiu reganta klaso kiu iris antaŭ vi. Tion kion vi klare vidas rilate al antikva propreco, kion vi konfesas rilate al feŭda propreco, vi kompreneble estas malpermesata konfesi pri via propra kapitalista propreco.

Forigo de la familio! Eĉ la plej radikalaj ekkoleriĝas je tiu ĉi malhonorega propono de la komunistoj.

Sur kia fondaĵo estas la nuntempa familio, la kapitalista familio, fondata? Sur kapitalo, sur privata gajno. En ĝia plene disvolvita formo tiu ĉi familio ekzistas nur inter la kapitalistaro. Sed tiu stato de aferoj trovas sian komplementon en la praktika neesto de la familio inter la proletarioj, kaj en publika prostituado.

La kapitalista familio malaperos, estas kompreneble, kiam ĝia komplemento mal-

aperos, kaj ambaŭ malaperos je la malapero de kapitalo.

Ĉu vi ŝarĝas nin je la deziro ĉesigi la ekspluatadon de infanoj de iliaj gepatroj? Tiun ĉi krimon ni konfesas.

Sed, vi diros, ni detruas la plej sanktajn rilatojn, kiam ni anstataŭas la hejman edukadon per la socia.

Kaj via edukado! Ĉu tiu ankaŭ ne estas socia, kaj determinata de la sociaj kondiĉoj sub kiuj vi edukadas, kaj per la interveno, senpera aŭ pera, de la socio per lernejoj, k.t.p.? La komunistoj ne elpensis la intervenon de la socio en edukadon; ili nur provas ŝanĝi la karakteron de tiu interveno, kaj savi edukadon el la influo de la reganta klaso.

La kapitalista sensencaĵo pri la familio kaj edukado, pri la sanktigitaj kunrilatoj de la gepatroj kaj infanoj, iĝas tute ju pli naŭza, des pli, per la agado de Moderna Industrio, ĉiuj familiaj ligoj inter la proletarioj estas disrompataj, kaj iliaj infanoj aliformigataj je simplajn aĵojn de komerco kaj ilojn de laboro.

Sed vi komunistoj ekstarigus komunecon je virinoj! ĥore kriegas la tuta kapitalistaro.

La kapitalisto vidas je sia edzino nur ilon de produktado. Li aŭdas ke la iloj de produktado estas ekspluatotaj komunume, kaj, nature, povas atingi nenian konkludon alian ol ke la sorto de komun-

eco al ĉiuj simile estos lotumata al la virinoj.

Li eĉ ne suspektas, ke la punkto efektive alcelata estas la forigo de la etato de la virinoj kiel nuraj iloj de produktado.

Pri la restaĵo, nenio estas pli ridinda, ol la virta indigno de nia kapitalistaro je la komuneco de virinoj, kiu, ili pretendas, estas malkaŝe kaj oficiale starigota de la komunistoj. La komunistoj havas nenian bezonon enigi komunecon de la virinoj. Ĝi jam ekzistas preskaŭ de tempo nememorebla.

Nia kapitalistaro, ne kontenta havante la edzinojn kaj filinojn de la proletariaro je sia dispono, ne priparoli pri ordinaraj komunulinoj, havas la plej grandan plezuron delogante unu la edzinon de alia.

Kapitalista edzeco estas efektive sistemo de edzinoj en komuneco, kaj tiel, la plejmulto je kiu la komunistoj eble povus esti riproĉataj estas, ke ili deziras enporti, anstataŭ hipokrite kaŝata, malkaŝe legitimatan komunecon de virinoj. Pri la restaĵo, estas memevidente, ke la forigo de la nuntempa sistemo de produktado devegas kunporti kun si la forigon de la komuneco de virinoj elkreskantan el tiu sistemo, t. e., la forigon de la prostituado, ambaŭ publika kaj privata.

La komunistoj estas plue riproĉataj je la deziro forigi la landojn kaj la naciecojn.

La laboristoj havas nenian landon. Oni

ne povas forpreni de ili tion kion ili ne posedas. Ĉar la proletario, unue el ĉio, devas akiri politikan superecon, devas leviĝi ĝis ĝi estos la plej antaŭa klaso el la nacio, devas starigi sin kiel la nacio, ĝi estas, tiel multe, nacia, kvankam ne laŭ la kapitalista senco de la vorto.

Naciaj diferencoj, kaj antagonismoj inter popoloj, ĉiutage pli kaj plimulte malaperas, sekve de la disvolviĝo de la kapitalistaro, de la libereco de komerco, de la tutmonda vendejego, de unuformeco en la metodo de produktado kaj en la kondiĉoj de vivo respondaj al tio.

La supereco de la proletariaro igos ilin malaperi pli kaj pli rapide. Kuna agado, almenaŭ de la plej antaŭaj civilizitaj nacioj, estas unu el la unuaj kondiĉoj por la liberigo de la proletariaro.

Proporcie kiel la ekspluatado de unu individuo de alia finiĝos, la ekspluatado de unu nacio de alia estos ankaŭ finata. Proporcie kiel la antagonismo inter klasoj interne de la nacio malaperas, la malamikeco de unu nacio kontraŭ la alia atingos sian finon.

La kulpigoj kontraŭ komunismo farataj de religia, filozofia, kaj ĝenerale de teorista vidpunkto, ne meritas seriozan ekzamenon.

Ĉu profunda komprenemo necesas por kompreni ke la ideoj, vidoj, kaj ideiĝoj de la homo, unuvorte, la konscieco de la homo ŝanĝas kun ĉiu ŝanĝo en la kondiĉoj de

lia materia ekzistado, en liaj sociaj rilatoj kaj en lia socia vivo?

Kion alian pruvas la historio de ideoj, ol ke la intelekta produktado ŝanĝiĝas laŭ karaktero proporcie kiel la materia produktado estas ŝanĝata? La regantaj ideoj de ĉiu epoko estis ĉiam la ideoj de ĝia reganta klaso.

Kiam oni priparolas ideojn kiuj revoluciigas la socion, ili nur esprimas la fakton, ke interne de la malnova socio, estas kreitaj la elementoj ne nova, kaj ke la dissolvado de la malnovaj ideoj egale progresas kun la dissolvado de la malnovaj kondiĉoj de ekzistado.

Kiam la antikva mondo estis en siaj mortdoloregoj, la antikvaj religioj estis venkataj de kristanismo. Kiam kristanaj ideoj cedis en la dekoka jarcento al racionalismaj ideoj, la feŭda socio faris sian mortbatalon kontraŭ la tiame revolucia kapitalistaro. La ideoj pri religia libereco kaj libereco de la konscienco nur esprimis la regadon de libera konkurado en la regionoj de la scio.

"Sendube," estos dirate, "religiaj, moralaj, filozofiaj kaj juĝsciencaj ideoj estas ŝanĝitaj laŭ la kurso de historia disvolviĝado. Sed la religio, la moralo, la filozofio, la politika scienco, konstante postvivas tiun ŝanĝon.

"Ekzistas, cetere, eternaj veroj, tiaj kiaj Libereco, Justeco, k. c., kiuj komunas je ĉiuj statoj de la socio. Sed komunismo

forigas eternajn verojn, ĝi forigas ĉian religion kaj ĉian moralecon, anstataŭ restarigi ilin sur novan fondaĵon; ĝi tial agas kontraŭe al ĉia estinta historia sperto."

Al kio tiu ĉi kulpigo sin redukcias? La historio de la tuta estinta socio konsistis el la kreskado de klasaj antagonismoj, de antagonismoj kiuj prenis sur sin diversajn formojn dum diversaj epokoj.

Sed, kian ajn formon ili estas prenintaj, unu fakto komunas je ĉiuj estintaj epokoj, t. e., la ekspluatado de unu parto de la socio sub la alia. Ne mirinde estas, do, ke la socia konscieco de estintaj epokoj, spite la ĉioma multobleco kaj diverseco kiun ĝi elmontras, movas laŭ certaj komunaj formoj, aŭ ĝeneralaj ideoj, kiuj ne povas tute malaperi sen la tuta malapero de klasaj antagonismoj.

La komunista revolucio estas la plej radikala rompo de tradiciaj proprecaj rilatoj; ne estas mirinde ke ĝia kreskado envolvas la plej radikalan rompon de tradiciaj ideoj.

Sed ni finu pri la kapitalistaj kontraŭdiroj kontraŭ komunismo.

Ni vidis supre, ke la unua paŝo en la revolucio de la laborklaso estas levi la proletarion al la pozicio de reganta klaso, venki en la batalo de la demokratio.

La proletariaro uzos sian politikan superecon por forpreni, grade, la tutan kapitalon de la kapitalistaro; centrigi ĉiujn rimedojn de produktado en la kontrolon de la ŝtato, t. e., de la proletariaro organizata kiel

la reganta klaso; kaj kreskigi la tuton de produktantaj povoj kiel eble plej rapide.

Kompreneble, je la komenco tiu ĉi ne povas efektiviĝi escepte per despotaj trudoj al la rajtoj de propreco kaj al la kondiĉoj de kapitalisma produktado; per rimedoj, do, kiuj ŝajnas ekonomie nesufiĉaj kaj neteneblaj, sed kiuj, laŭ la kurso de la movado, preterpasas sin mem, necesigante pluajn trudojn al la malnova socia ordo, kaj estas neeviteblaj kiel rimedoj por la plena revoluciado de la metodo de produktado.

Kompreneble, tiuj ĉi rimedoj diferencos en diversaj landoj.

Tamen, en la plej antaŭaj landoj la sekvantaj estos tute ĝenerale alfareblaj:

1. Forigo de propreco de tero kaj uzado de ĉiuj lupagoj je la tero por bezonoj publikaj.

2. Peza progresanta aŭ gradigita renta imposto.

3. Forigo de ĉiuj rajtoj de heredo.

4. Ŝtata ekpreno de la posedaĵo de ĉiuj elmigrantoj kaj ribelantoj.

5. Alcentrigo de la kredito al kontrolo de la ŝtato, per nacia banko havanta ŝtatan kapitalon kaj eksklusivan monopolon.

6. Alcentrigo de la rimedoj de interkomunikado kaj transportado al la kontrolo de la ŝtato.

7. Vastigado de fabrikejoj kaj iloj de produktado posedataj de la ŝtato; la sub-

meto al kulturo de dezertaj teroj, kaj la plibonigo de la tero ĝenerale laŭ komuna plano.

8. Egala devego de ĉiuj labori. Starigo de industriaj armeoj, speciale por la terkulturado.

9. Kunligo de la terkulturo kun fabrikaj industrioj; laŭgrada forigo de la distingo inter urbo kaj kamparo, per pli egala dislokiĝo de la popolo tra la kamparo.

10. Senpaga edukado por ĉiuj infanoj en publikaj lernejoj. Forigo de enfabrikeja laboro de infanoj laŭ ĝia nuna formo. Kunigo de edukada laboro kun industria produktado, k. c., k. c.

Kiam, laŭ la kurso de disvolviĝado, klasaj distingoj estos malaperintaj, kaj ĉia produktado koncentriĝinta en kontrolon de vasta asocio konsistanta el la tuta nacio, la publika povo perdos sian politikan karakteron. Politika povo, prave tiel nomata, estas nur la organizita povo de unu klaso por subpremi alian. Se la proletariaro, dum sia batalo kun la kapitalistaro, estas devegata, per la povo de cirkonstancoj, sin organizi kiel klaso; se, per revolucio, ĝi igas sin la reganta klaso, kaj, kiel tia, forbalaas perforte la malnovajn kondiĉojn de la produktado, tiam, kune kun tiuj kondiĉoj, ĝi estos forbalainta la kondiĉojn por la ekzistado de klasaj antagonismoj, kaj de klasoj ĝenerale, kaj estos

foriginta tiele sian propran superecon kiel klaso.

Anstataŭ la malnova kapitalista socio kun ĝiaj klasoj kaj klasaj antagonismoj, ni havos asocion, en kiu la libera kreskado de ĉiu estas la libera kondiĉo por la kreskado de ĉiuj.

---

## III
## SOCIALISTA KAJ KOMUNISTA LITERATURO

### *1. Reakcia Socialismo*

#### *a. Feŭda Socialismo*

Pro ilia historia situacio, fariĝis la okupo de la aristokrataroj de Francujo kaj Germanujo verki pamfletojn kontraŭ la moderna kapitalista socio. En la franca revolucio de Julio, 1830, kaj dum la angla reforma agitado, tiuj ĉi aristokrataroj ree cedis al la malaminda elsaltulo. De tiam, serioza politika konkuro estis tute ekster la eblaĵoj. Literatura batalado sole restis ebla. Sed eĉ en la regejo de la literaturo la malnovaj krioj de la *restoration*'a[1] tempo fariĝis neeblaj.

Por veki simpation, la aristokrataro devegis meti for la zorgon, ŝajne, pri siaj propraj interesoj, kaj formuli sian kulpigon kontraŭ la kapitalistaro por la intereso sole de la ekspluatata laborklaso. Tiel la aristokrataro devegis, por revenĝo,

---

(1) Ne la angla "Restoration" 1660. ĝis 1689, sed la franca "Restoration" 1814 ĝis 1830.

kanti satiraĵojn kontraŭ sia nova reganto, kaj paroleti en liajn orelojn minacajn profetaĵojn pri venonta katastrofo.

Tiamaniere eklevigis la feŭda socialismo: duone ploraĵo, duone satiraĵo; duone eĥo el la estinteco, duone minaco al la estonteco; kelkfoje per sia maldolĉa, sprita kaj akra kritiko frapante la kapitalistaron ĝis la internaĵo de la koro, sed ĉiam rideginda je siaj rezultatoj, pro tuta nekapableco kompreni la marŝon de la moderna historio.

La aristokrataro, por varbi al si la homojn, flirtigis ĉe la fronto la proletarian almozosaketon kiel standardon. Sed la popolo, tiel ofte kiel ĝi aliĝis ilin, vidis sur iliaj postaĵoj la malnovajn feŭdajn blazonŝildojn, kaj forlasis ilin kun laŭta kaj neriverenca ridado.

Unu sekcio el la francaj Legitimistoj, kaj "Juna Anglujo" prezentis tiun spektaklon.

Elmontrante ke ilia metodo de ekspluatado diferencis je tiu de la kapitalistaro, la feŭdistoj forgesis ke ili ekspluatis laŭ cirkonstancoj kaj kondiĉoj kiuj estis tute malsamaj, kaj kiuj nun estas antikviĝintaj. Montrante, ke sub sia regado la moderna proletariaro neniam ekzistis, ili forgesis ke la moderna kapitalistaro estas la necesa elkreskaĵo de ilia propra formo de socio.

Rilate al la aliaj, tiel malmulte ili kaŝas la reakcian karakteron de sia kritiko, ke ilia ĉefa kulpigo kontraŭ la kapitalistaro sumiĝas jene: ke sub la kapitalista regado klaso estas kreskigata, kiu estas

destinata eltranĉi radikon kaj branĉon de la malnova formo de la socio.

Tio je kio ili kulpigas la kapitalistaron ne estas tiom ke ĝi kreas proletariaron kiom ke ĝi kreas revolucian proletarion.

En la politika praktiko, tial, ili aliĝas al ĉiuj perfortaj agadoj kontraŭ la laborklaso; kaj en la privata vivo, malgraŭ siaj belsonaj frazoj, ili kliniĝas por ekpreni la orajn pomojn falintajn el la arbo de la industrio, kaj por intermarĉandi la veron, la amon, kaj la honoron por la komercado je lano, betsukero, kaj spirituso terpoma.[1]

Kaj kiel la pastro ĉiam marŝis mano en mano kun la bienulo, tiel ankaŭ marŝis pastrara socialismo kun feŭda socialismo.

Nenio estas pli facila ol doni al kristana asketicismo socialistan nuancon. Ĉu ne kristanismo deklamis kontraŭ la privata propraĵo, kontraŭ la edzeco, kontraŭ la ŝtato? Ĉu ĝi ne predikis anstataŭ tiuj ĉi almozdonadon kaj malriĉecon, fraŭlecon kaj subpremadon de la "karno," la monaĥejan vivadon kaj eklezion patrinan? Kristana socialismo estas nur la sankta akvo per kiu la pastro dediĉas kordolorojn de la aristokrato.

---

(1) Tiu ĉi rilatas precipe Germanujon, kie la biena aristokrataro kaj nobelaĉuloj kulturigas por sia propra kalkulo grandajn porciojn da siaj bienoj, per administrantoj, kaj estas, plue, pograndaj betsukeraj fabrikantoj kaj distilantoj de spirituso terpoma. La pli riĉaj britaj aristokratoj estas ankoraŭ iom pli altaj ol tio; sed ili, ankaŭ, scias kiel sin rekompenci por malpligrandiĝantaj rentoj per la prunto de siaj nomoj al iniciatoroj de pli malpli "mallumaj" akci-kompanioj.

### *b. Kapitaletula Socialismo*

La feŭda aristokrataro ne estis la sola klaso ruinigata de la kapitalistaro, ne la sola klaso kies kondiĉoj de ekzistado forvelkis kaj pereis en la atmosfero de la nuntempa kapitalista socio. La mezepokaj burĝoj kaj la malgrandaj farmistaj kapitalistoj, estis la antaŭuloj de la moderna kapitalistaro. En tiuj landoj, kiuj estas nur malmulte disvolviĝintaj, industrie kaj komerce, tiuj du klasoj ankoraŭ kreskadas flanko flankon kun la leviĝanta kapitalistaro.

En landoj kie la moderna civilizacio estas plene kreskinta, nova klaso de kapitaletuloj estas formita, ŝanceliĝante inter proletariaro kaj kapitalistaro, kaj ĉiam sin renovigante kiel aldonatan parton de la kapitalista socio. La individuaj membroj de tiu ĉi klaso, tamen, estas konstante ĵetataj malsupren en la proletariaron per la agado de la konkurado, kaj, dum la moderna industrio kreskas, ili eĉ vidas alproksimiĝanta la momenton kiam ili tute malaperos kiel nedependa sekcio de la moderna socio, anstataŭote, en la fabrikado, la terkulturo kaj la komerco, de superuloj, administrantoj kaj laborestroj.

En tiaj landoj kia Francujo, kie la farmistoj estas multe pli ol duono da la loĝantaro, estis nature ke la verkistoj, kiuj staras kun la proletariaro kontraŭ la kapitalistaro uzas, en sia kritiko pri la kapitalista regado, la mezurilon de la farmisto kaj kapitaletulo, kaj de la vidpunkto de tiuj

intermezaj klasoj eklevas la bastonegojn por la laborklaso. Tiel leviĝis la kapitaletula socialismo. Sismondi estis la estro de tiu ĉi anaro, ne sole en Francujo, sed ankaŭ en Anglujo.

Tiu ĉi skolo de la socialismo dispecigis kun granda komprenemo la kontraŭaĵojn en la kondiĉoj de moderna produktado. Ĝi nudigis la hipokritajn apologiojn de ekonomiistoj. Ĝi pruvis, nekontraŭdireble, la katastrofajn rezultatojn de la maŝinaro kaj la divido de laboro; la koncentrigo de la kapitalo kaj la tero en malmultajn manojn; troproduktado kaj krizoj; ĝi elmontris la neeviteblan ruinigon de la kapitaletulo kaj farmisto, la mizeron de la proletariaro, la anarĥion en la produktado, la treegajn neegalecojn en la distribuado de riĉeco, la industrian bataladon de ekstermo inter nacioj, la dissolvon de malnovaj moralaj ligoj, familiaj rilatoj kaj naciecoj.

Laŭ siaj pozitivaj celoj, tamen, tiu ĉi speco de socialismo aspiras aŭ restarigi la malnovajn rimedojn de produktado kaj interŝanĝado, kaj kun ili la malnovajn proprecajn rilatojn, kaj la malnovan socion, aŭ premadi la modernajn rimedojn de produktado kaj interŝanĝado en la kadro de la malnovaj proprecaj rilatoj, kiuj estis, kaj destiniĝis esti, tiele eksplodigitaj. Iaokaze, ĝi estas ambaŭ reakcia kaj utopia.

Ĝiaj lastaj vortoj estas: enkorpigitaj gildoj por la fabrikado; patriarkaj rilatoj en la terkulturo.

Fine, kiam obstinaj historiaj faktoj estis dispelintaj ĉiujn ebriigantajn efikaĵojn de memtrompo, tiu ĉi speco de socialismo finiĝis per mizera atako de malespero.

*Germana aŭ "Vera" Socialismo*

La socialista kaj komunista literaturo de Francujo, literaturo kiu komenciĝis sub la premado de kapitalistaro en regado, kaj kiu estis la esprimo de la batalado kontraŭ tiu ĉi povo, enportiĝis en Germanujon dum tempo kiam la kapitalistaro, en tiu lando, estis ĵus komencinta sian konkuron kun la feŭda absolutismo.

Germanaj filozofoj, mem-nomitaj filozofoj kaj *beaux esprits* (belmensuloj), avide ekkaptis tiun ĉi literaturon, nur forgesante, ke kiam la diritaj skribaĵoj enmigris de Francujo en Germanujon, francaj sociaj kondiĉoj ne enmigris kune kun ili. Tuŝante germanajn sociajn kondiĉojn, tiu ĉi franca literaturo tute perdis sian rektan praktikan signifon, kaj alprenis tute literaturan ŝajnon. Tiel, al la germanaj filozofoj de la dekoka jarcento, la postuloj de la unua Franca Revolucio estis nenio pli ol la postuloj de la "praktika rezono" ĝenerale, kaj la eldiroj de la volo de la revoluciema franca kapitalistaro signifis, laŭ iliaj opinioj, la leĝojn de la pura volo, de la volo kiel ĝi devegas esti, de la vera homa volo ĝenerale.

La laboro de la germanaj verkistoj konsistis tute en la harmoniigo de la novaj

francaj ideoj kun ilia antikva filizofia konscienco, aŭ pli ĝuste, en la alprenado de la francaj ideoj, ne forlasante ilian propran filozofian vidpunkton.

Tiu ĉi alpreno fariĝis sammaniere kiel fremda lingvo estas alproprigata, nome per traduko.

Estas bone konate kiel la monaĥoj skribis sensencajn biografiojn de katolikaj sanktuloj super la manuskriptoj sur kiuj la klasikaj verkoj de antikvaj idolanoj estis skribitaj. La germanaj verkistoj maligis tiun ĉi procedon je la nereligia franca literaturo. Ili skribis sian filozofian sensencaĵon *sub* la franca originalo. Ekzemple, sub la franca kritiko pri la ekonomiaj funkcioj de la mono, ili skribis "Fremdiĝo de l' Homaro," kaj sub la franca kritiko pri la kapitalista ŝtato ili skribis "La Detronigo de la Kategorio de la Ĝenerala," kaj tiel plu.

La enigo de tiuj ĉi filozofiaj frazoj ĉe la la posto de la francaj historiaj kritikoj ili nomis "La Filozofio de l' Agado," "Vera Socialismo," "La Germana Scienco de la Socialismo," "La Filozofia Fondaĵo de Socialismo," kaj tiel plu.

La franca socialista kaj komunista literaturo tiel estis tute senfortigita. Kaj, ĉar ĝi ĉesis, en la manoj de la germano, esprimi la bataladon de unu klaso kontraŭ la alia, li sentis sin konscia ke li venkis la "francan unuflankecon" kaj ke li reprezentas, ne verajn postulojn, sed la postulojn de la vero; ne la interesojn de la proletariaro,

sed la interesojn de la homa naturo, de la homo ĝenerale, kiu apartenas al nenia klaso, havas nenian realecon, kiu ekzistas nur en la nuba regiono de filozofa fantazio.

Tiu ĉi germana socialismo, kiu pripensis sian lerneja-knaban taskon tiel serioze kaj solene, kaj laŭdegis siajn maltaŭgajn komercaĵojn tiel ĉarlatane, samtempe grade perdis sian pedantan naivecon,

La batalo de la germana, kaj speciale de la prusa kapitalistaro, kontraŭ feŭda aristokrataro kaj absoluta monarĥaĵo, alivorte la libera movado, fariĝis pli serioza.

Per tio, la de longe dezirata okazo sin prezentis, por ke "vera socialismo" kontraŭstaru la politikan movadon per la socialistaj postuloj, ke ĝi ĵetegu la tradiciajn malbenojn kontraŭ la liberalismo, kontraŭ la reprezenta registaro, kontraŭ kapitalista konkurado, kapitalista libereco de presado, kapitalista leĝfarado, kapitalista libereco kaj egaleco; kaj ke ĝi prediku al la amasoj ke ili povas nenion gajni kaj ĉion perdi per la dirita kapitalista movado. La germana socialismo forgesis, ĝustatempe, ke la franca kritiko, kies sensenca eĥo ĝi estas, antaŭsupozas la ekziston de moderna kapitalista socio, kun ĝiaj respondaj ekonomiaj kondiĉoj de ekzistado, kaj la politika konstitucio adaptata al ĝi—precize la aferojn kies atingo estis la celo de la minacanta batalado en Germanujo.

Al la aŭtokrataj registaroj, kun ilia

sekvantaro de pastroj, profesoroj, kamparaj nobeletuloj kaj oficistoj, ĝi servis kiel bonvena korvtimigilo kontraŭ la minacanta kapitalistaro.

Estis dolĉa fino post la acidaj piloloj el vipadoj kaj kugloj kiujn, ĝuste en tiu tempo, tiuj samaj registaroj dozdonis al germanaj laborklasaj ekstariĝoj.

Dum tiu ĉi "vera" socialismo tiel servis al la registaroj kiel armilo por batali kontraŭ la germana kapitalistaro, ĝi samtempe rekte reprezentis reakcian intereson la intereson de la germanaj filistroj. En Germanujo la kapitaletula klaso, antikvaĵo de la deksesa jarcento, kaj post tiam konstante reaperante en diversaj formoj, estas la reala socia fondaĵo de la ekzistanta stato de aferoj.

Daŭrigi tiun ĉi klason estas daŭrigi la ekzistantan staton de aferoj en Germanujo. La industria kaj politika supereco de le kapitalistaro minacas ĝin je certa detruo; unuflanke, per la koncentrigo de la kaptalo; aliflanke, per la kreskado de revolucia proletariaro. "Vera" socialismo ŝajnis mortigi tiujn ĉi du birdojn per unu ŝtono. Ĝi dissemiĝis kiel epidemio.

La robo el spekulaciaj araneaĵoj, brodita per floroj de retoriko, trempita en la roso de naŭza sentimentaleco, tiu ĉi supernatura robo en kiu la germanaj socialistoj envolvis siajn maltaŭgajn "eternajn veraĵojn," tute el haŭto kaj ostoj, mirinde pligrandigis la vendadon de ilia komercaĵo inter tia publiko.

Kaj siavice, la germana socialismo rekonis, pli kaj pli multe, sian propran mision kiel la bruega reprezentanto de la kapitaletulaj filistroj.

Ĝi proklamis ke la germana nacio estas la modela nacio, kaj ke la germana eta filistro estas la tipa homo. Al ĉiu fripona malgrandanimeco de tiu ĉi modela homo ĝi donis kaŝatan, pli altan, socialistan tradukon, la rektan kontraŭaĵon de ĝia reala karaktero. Ĝi alvenis al la ekstrema limo, rekte kontraŭstarante la "brute detrueman" inklinon de komunismo, kaj proklamante sian plejan kaj nepartian malestimon al ĉiuj interklasaj bataladoj. Kun tre malmultaj esceptoj, ĉiuj tiel-nomataj socialistaj kaj komunistaj eldonaĵoj kiuj nun (1847) dissemiĝas en Germanujo apartenas al la kampo de tiu ĉi malpura kaj sennerviganta literaturo.

---

### 2. *Konservativa aŭ Kapitalista Socialismo*

Parto de la kapitalistaro deziras korekti sociajn maljustaĵojn, por certigi la daŭrantan ekzistadon de la kapitalista socio.

Al tiu sekcio apartenas ekonomiistoj, filantropoj, homaristoj, plibonigantoj de la kondiĉo de la laborklaso, organizantoj de bonfarado, anoj de societoj por la malpermesado de kruelaĵoj al bestoj, malebriecaj fanatikuloj, "truaj kaj angulaj" reformistoj de ĉiu priimagebla speco. Tiu ĉi formo de socialismo estas, plue, ellaborita en plenajn sistemojn.

Ni povas citi la de Proudhon *Philosophie de la Misere* kiel ekzemplon de tiu ĉi formo.

La socialista kapitalistaro deziras ĉiujn la profitojn de modernaj sociaj statoj, sen la bataladoj kaj danĝeroj necese rezultantaj de ĝi. Ili deziras la nun-ekzistantan staton de la socio sen ĝia revoluciaj kaj disigantaj elementoj. Ili deziras kapitalistaron sen proletariaro. La kapitalistaro nature opinias ke la mondo en kiu ĝi regas estas la plej bona; kaj kapitalista socialismo ellaboras tiun ĉi komfortan opinion en diversajn pli aŭ malpli plenajn sistemojn. Postulante ke la proletariaro plenumu tian sistemon, kaj tiel marŝu rekte en la socian Nov-Jeruzalemon, ĝi efektive nur postulas ke la proletariaro restu interne la limojn de la nunekzistanta socio, sed ke ĝi forĵetu ĉiujn siajn malamajn ideojn pri la kapitalistaro.

Dua kaj pli praktika, sed malpli sistema formo de tiu ĉi socialismo klopodis maltaŭgigi en la opinioj de la laborklaso ĉiun revolucian movadon, montrante ke nenia nure politika reformo, sed nur ŝanĝo en la materiaj kondiĉoj de la ekzistado, en la ekonomiaj rilatoj, povus porti al ili ian profiton. Per ŝanĝoj de la materiaj kondiĉoj de la ekzistado, tamen, tiu ĉi formo de socialismo neniel intencas la forigon de la kapitalistaj rilatoj de la produktado, forigo kiu povas efektiviĝi nur per revolucio, sed administraciajn reformojn, fondatajn sur la daŭriganta ekzistado de

tiuj ĉi rilatoj; reformojn, tial, kiuj neniel influas la rilatojn inter la kapitalo kaj la laboro, sed, en la ekstrema okazo, malpligrandigas la koston kaj simpligas la administracian laboron de kapitalista regado.

Kapitalista socialismo atingas adekvatan esprimon, kiam, kaj nur kiam, ĝi fariĝas nura figuro el vortoj.

Libera komercado—por la profito de la laborklaso. Protektaj limimpostoj—por la profito de la laborklaso. Karcereja reformado—por la profito de la laborklaso. Jen estas la lasta vorto kaj la sola serioze intencata vorto de kapitalista socialismo.

Ĝi sumiĝas per la frazo: la kapitalisto estas kapitalisto—por la profito de la laborklaso.

### 3. *Kritika-Utopia Socialismo kaj Komunismo*

Ni ne tie ĉi priparolas pri tiu literaturo, kiu en ĉiu granda moderna revolucio, donis voĉon al la demandoj de la proletariaro—tia kia la verkoj de Babeuf kaj aliaj.

La unuaj rektaj penadoj de la proletariaro por atingi siajn proprajn celojn, farataj dum tempoj de universala ekscito, kiam la feŭda socio renversiĝas, tiuj ĉi penadoj necese malsukcesis, pro la tiama kruda stato de la proletariaro, tiel bone kiel pro la neĉeesto de la ekonomiaj kondiĉoj por ĝia liberigo, kondiĉoj kiuj ankoraŭ devos esti produktataj, kaj povos esti produktataj nur per la

venonta kapitalista epoko. La revoluciema literaturo kiu akompanis tiujn ĉi unuajn movadojn de la proletariaro necese havis reakcian karakteron. Ĝi instruis universalan asketismon kaj socian ebenigon en ĝia plej kruda formo.

La socialistaj kaj komunistaj sistemoj prave tiel nomataj, tiuj de St. Simon, Fourier, Owen kaj aliaj, naskiĝis dum la frua kruda periodo, supre priskribita, de la batalado inter la proletariaro kaj kapitalistaro (vidu sekcion I^an^, *Bourgeosie and Proletariat*).

La fondantoj de tiuj ĉi sistemoj vidas, ja, la klasajn antagonismojn, tiel bone kiel la agadon de la disrompigantaj elementoj en la reganta formo de la socio. Sed la proletariaro, ankoraŭ en ĝia infaneco, ŝajnas al ili klaso sen historia iniciativo aŭ ia nedependa historia movado.

Ĉar la kreskado de la klasa antagonismo faras egalajn paŝojn kun la disvolviĝo de la industrio, la ekonomia stato, kiel ili ĝin trovas, ne ankoraŭ prezentas al ili la materiajn kondiĉojn por la liberigo de la proletariaro. Ili tial serĉas novan socian sciencon, novajn sociajn leĝojn, kiuj estas kreontaj tiajn kondiĉojn.

La historia agado estas cedonta al ilia persona elpensema agado, historie kreataj kondiĉoj por liberigo al kondiĉoj fantaziaj, kaj la laŭgrada, spontanea klasa organizado de la proletariaro cedos al organizo de la socio speciale ellaborata de tiuj ĉi

elpensistoj. La estonta historio solvas sin, laŭ iliaj opinioj, en la propagandon kaj la praktikan plenumon de iliaj sociaj planoj.

En la formado de siaj planoj, ili konscias ke ili zorgas precipe pri la laborklaso, kiel la plej suferanta klaso. Nur kiel ili ĝin rigardas kiel la plej suferantan klason havas la laborklaso por ili ian ekziston.

La kruda stato de la interklasa batalado, tiel multe kiel iliaj propraj ĉirkaŭaĵoj, igis socialistojn de tiu speco sin opinii alte superaj de ĉiuj klasaj antagonismoj. Ili deziras plibonigi la staton de ĉiu membro de la socio, eĉ tiun de la plej favorata. De tio, ili kutime adresas la socion ĝenerale, sen distingo pro klaso; ne, prefere, la regantan klason. Ĉar kiel povas la popolo, kiam ili komprenos ilian sistemon, eviti vidi en ĝi la planon kiel eble plej bonan por la stato kiel eble plej bona de la socio.

Tial, ili malakceptas ĉian politikan, kaj speciale ĉian revolucian agadon; ili volas atingi siajn celojn per pacaj rimedoj, kaj penadas, per malgrandaj eksperimentoj, necese sortigataj al malsukceso, kaj per la potenco de ekzemplo, pavimi la vojon al la nova socia evangelio.

Tiaj fantaziaj pentraĵoj de la estonta socio, pentrataj en tempo kiam la proletariaro ankoraŭ estas en tre kruda stato, kaj havas nur fantazian ideon pri sia propra stato, respondas al la unuaj instinktaj sopi-

radoj de tiu klaso por ĝenerala rekonstruado de la socio.

Sed la diritaj socialistaj kaj komunistaj eldonaĵoj enhavas ankaŭ kritikan elementon. Ili atakas ĉiun principon de la ekzistanta socio. Tial ili estas plenaj je la plej multvaloraj materialoj por la klerigado de la laborklaso. La praktikaj rimedoj en ili proponataj, tiaj kia la forigo de la distingo inter la urboj kaj la kamparo, de la familio, de la administrado de industrioj por la profito de privataj individuoj, kaj de la salajra sistemo, la proklamo de socia harmonio, la ŝanĝo de la funkcioj de la Ŝtato en nuran administradon de produktado, ĉiuj ĉi tiuj proponoj celas sole al la malapero de klasaj antagonismoj kiuj estas, en tiu tempo, nur ekaperantaj, kaj kiuj estas, en tiuj ĉi eldonaĵoj, rekonataj sole en siaj plej fruaj, instinktaj kaj nedifinitaj formoj. Tiuj ĉi proponoj havas, tial, karakteron pure utopian.

La signifo de la kritika-utopia socialismo kaj komunismo havas inversan rilaton al historia disvolviĝado. Laŭ proporcio kiel la interklasa batalado disvolviĝas, kaj alprenas difinitan formon, tiu ĉi fantazia forstaro de la konkuro, tiuj ĉi fantaziaj atakoj kontraŭ ĝi, perdas ĉian praktikan valoron kaj ĉioman teorian pravecon. Tial, kvankam la elpensintoj de tiuj ĉi sistemoj estis, en multaj manieroj, revoluciaj, iliaj sekvantoj en ĉiu okazo, fariĝas nur reakciaj sektoj. Ili forte tenas la orig-

inalajn opiniojn de siaj regantoj, opozicie al la progresa historia kreskado de la proletariaro. Ili tial penadas, konforme al siaj teorioj, mildigi la interklasan bataladon kaj pacigi la interklasajn antagonismojn. Ili ankoraŭ revas pri la eksperimentan realigon de siaj sociaj utopioj, pri la fondado de izolataj "falansterioj," la kreado de "hejmaj kolonioj," pri ekstarigo de "Malgranda Ikario"[1]—miniaturaj eldonaĵaj de la Nov-Jeruzalemo, kaj por realigi ĉiujn ĉi tiujn "kastelojn en la aero" ili devegas sin turni al la sentoj kaj monujoj de la kapitalistaro. Ili grade malleviĝas en la kategorion de la reakciaj konservativaj socialistoj pli supre priskribataj, diferencante de tiuj ĉi nur per pli sistema pedanteco, kaj per sia fanatika kaj superstiĉa kredo al la miraklaj efikaĵoj de sia socia scienco.

Tial, ili treege kontraŭstaras ĉian politikan agadon faratan de la laborista klaso; tia agado, laŭ ilia diro, povus deveni nur de blinda malkredemo al la nova evangelio.

La Owen'anoj en Anglujo, kaj la Fourier'anoj en Francujo, siavice kontraŭstaras la Ĉartistojn kaj la "Reformistojn."

(1) Falansterioj estas socialistaj kolonioj laŭ la plano de Karolo Fourier; Ikario estas la nomo donita de Kabet al sia utopio kaj, poste, al sia amerika komunista kolonio.

## IV

## SINTENADO DE LA KOMUNISTOJ RILATE AL LA DIVERSAJ EKZISTANTAJ PARTIOJ OPOZICIAJ

Sekcio IIa klarigis la rilatojn de la komunistoj al la ekzistantaj laborklasaj partioj, tiaj kiaj la Ĉartistoj en Anglujo kaj la Terdividaj Reformantoj en Ameriko.

La komunistoj batalas por la atingo de la tujaj celoj, por la realigo de la momentaj interesoj de la laborklaso; sed en la movado nuntempa, ili ankaŭ reprezentas kaj zorgas pri la estontaĵojn de tiu movado. En Francujo la komunistoj kunigas sin kun la socia-demokratoj,[1] kontraŭ la konservativa kaj radikala kapitalistaroj, rezervante, tamen, la rajton alpreni kritikan sintenadon rilate al frazoj kaj iluzioj hereditaj de la granda revolucio.

En Svislando ili kunhelpas la radikalojn, ne perdante la vidon al la fakto ke tiu ĉi partio konsistas el elementoj kontraŭaj, parte el demokrataj socialistoj, laŭ la franca senco, parte el radikalaj kapitalistoj.

En Polujo ili aliĝas al tiu partio kiu

---

(1) Tiu partio tiam reprezentata de Ledru-Rollin en parlamento, de Louis Blanc en literaturo, de la Reforme en la ĉiutaga ĵurnalaro. La nomo de Socia Demokratio signifis, al tiuj ĉi, siaj elpensintoj, sekcion de la demokrata aŭ respublika partio pli malpli nuancita de socialismo.

insistas pri terdivida revolucio, kiel la unua kondiĉo por nacia liberiĝo, tiu partio kiu instigis la ribelon ĉe Krakovo en 1846.

En Germanujo ili kunbatalas kun la kapitalistaro kiam ĝi agadas revolucie, kontraŭ la absoluta monarĥaĵo, la feŭda nobeletaro kaj la kapitaletularo.

Sed ili neniam, eĉ unu momenton, ĉesas lernigi al la laborklaso la kiel eble plej klaran komprenon de la malpacemaj antagonismoj inter la kapitalistaro kaj proletariaro, por ke la germanaj laborantoj povu tuj uzi, kiel tiom da batalaliloj kontraŭ la kapitalistaro, la sociajn kaj politikajn kondiĉojn kiujn la kapitalistaro necese devegas starigi kune kun sia supereco, kaj por ke, post la falo de la reakciaj klasoj en Germanujo, la batalo kontraŭ la kapitalistaro mem povu tuj komenci.

La komunistoj direktas sian atenton precipe al Germanujo, ĉar tiu lando estas ĉe la antaŭtago de kapitalista revolucio, destinita esti efektivigata laŭ la pli antaŭaj statoj de eŭropa civilizacio, kaj kun grande pli disvolviĝinta proletario, ol tiu de Anglujo en la deksepa, kaj de Francujo en la dekoka jarcento, kaj ĉar la kapitalista revolucio en Germanujo estos nur la antaŭludo al la tuje sekvonta proletaria revolucio.

Unuvorte, la komunistoj ĉie subtenadas ĉian revolucian movadon kontraŭ la nunekzistanta socia kaj politika ordo de la

aferoj.

En ĉiuj ĉi tiuj movadoj ili portas al la fronto, kiel la plej gravan demandon en ĉiu, la demandon propraĵan, kia ajn estas ĝia grado de disvolviĝo en tiu tempo.

Fine, ili ĉie laboradas por la unuiĝo kaj interkonsento de la demokrataj partioj de ĉiuj landoj.

La komunistoj rigardas kiel malinda la kaŝadon de siaj opinioj kaj celoj. Ili malkaŝe proklamas ke siaj celoj povos atingiĝi nur per la perforta renverso de ĉiuj nunekzistantaj sociaj kondiĉoj. Tremu la regantaj klasoj je komunista revolucio. La proletarioj havas nenion por malgajni krom siaj katenoj. Por gajni, ili havas mondon.

Laboristoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!